

# ESPERANTO INTERNACIA

Monata organo de la Internacia Esperanto - Ligo

Numero 13

Oktobro 1937

Eldonanto :  
Internacia Esperanto-Ligo,  
Heronsgate, Rickmansworth  
(Herts.), Anglujo.

Redaktoro : Teo JUNG  
223. Harstenhoekweg  
Scheveningen  
Nederlando.

## Brazilo eldonis Poŝtmarkon por memori pri la Ora Jubileo de Esperanto



Jam de kelka tempo la samideanaro estas informita pri la intenco de la Brazila Poŝta Departemento, eldoni specialan poŝtmarkon por memori pri la Ora Jubileo de Esperanto. Kaj jam de kelkaj monatoj do niaj legantoj atendas senpacience la pluan informon, ke la intenco fariĝis fakto.

Hodiaŭ ni povas kontentigi la scivolemon de nia legantaro. La projekto de

la brazila Poŝta Departemento fariĝis fakto: la nova poŝtmarko estas eldonita. Ĉi-supre ni prezentas ĝin en bildo (pli grandigita).

Post la kvinpinta verda stelo, kiel simbolo de la Esperanto-movado, kiu trovis lokon sur la brazila poŝtmarko eldonita honore al la lastjara brazila Esperanto-kongreso, — kio restis pli evidenta por simboligi nian tutmondan afero-

ron ol la terglobo, kiun ĉirkaŭas, trans kontinentojn kaj oceanojn, liganta rubando, kun la surskribo: ORA JUBILEO DE ESPERANTO!

Havis la ideon pri la bildo *D-ro João Licínio de Almeida*, ĝenerala sekretario de la Ministerio por Trafiko kaj Publikaj Laboroj. La poŝtmarko estas farita ĉe la Ŝtata Monfarejo sub la orientado de s-ro *L. de Campos*, ĉefo de la Sekcio pri Gravuraĵoj kaj tre simpatia al Esperanto. Ĝin desegnis s-ro *M. Pestana* kaj ĝin gravuris s-ro *W. Borges de Freitas*. La direktoro de la Ŝtata Monfarejo estas s-ro *Mansueto Bernardi*, kiu figuris en la Honora Komitato de la 9-a Brazila Kongreso de Esperanto.

Brazila Ligo Esperantista, Av. Marechal Floriano 212, Rio de Janeiro, Brazilo havigos al ĉiu samideano unu ekzempleron de la poŝtmarko, kiu al ĝi sendos unu respondkuponon. Kiu sendos du respondkuponojn, tiu ricevos, per rekomendita letero, unu ekzempleron de la memoriga poŝtmarko en la koverto kaj alian sur la koverto. Ni ne dubas, ke ĉiu samideano en la tuta mondo deziras posedi tiun ĉi unikan dokumenton oficialan pri la Ora Jubileo de nia afero.

La brazilan registaron, kaj precipe ĝian progreseman ministron por Trafiko kaj Publikaj Laboroj, ni tutkore dankas pro la atento refoje direktita al nia afero. Jen la sinjoro ministro faris ne nur ĝentilajn vortojn, kiajn ni ofte jam aŭdis de aliaj ministroj kaj eminentuloj, sed li kreis fakton! Fakton kiu parolas konvinkan lingvon, eĉ al tiuj kiuj ne volas kredi pri la venko de nia afero.

Certe, la eldono de poŝtmarko, aŭ la aperigo de serio da oficialaj poŝtkartoj kun Esperanto-teksto, ne signifas jam la venkon de nia afero, sed sen ia dubo tiaj oficialaj rekonaj, la apliko de Esperanto en la praktiko ĉe oficialaj instancoj, estas gravaj paŝoj antaŭen sur la vojo al nia celo. Kaj ja diris la majstro:

« ni paŝo post paŝo, post longa laboro, atingos la celon en gloro ».

# Diskutoj pri la IEL/UEA-problemo en Varsovio

## dum la Universala Kongreso de Esperanto, Aŭgusto 1937

Evidentiĝis jam en la komenco, ke estas forta deziro inter la Esperantistoj pri solvo de tiu problemo. En la unua kunsido de la IEL Komitato en Varsovio estas aranĝite, ke tri personoj, la Prezidanto kaj S-roj Hetzel kaj Bugge-Paulsen renkontu la reprezentantojn de UEA por prezenti al ili la jenan **Rezolucion** kaj donis ĝin je la 19a horo je la 8a de Aŭgusto 1937 al la Provizora Komitato de UEA:

Varsovio, la 8-an de Aŭgusto 1937.

Aŭdinte la raporton de la Prezidanto pri UEA kaj IEL, la Komitato unuanime opinias, ke unueco estas tre dezirinda por la bono de la movado. Sed ĝi konstatas, ke IEL de preskaŭ unu jaro montris plenan vivecon, diskonigis siajn celojn kaj la nombron de siaj membroj. Ĝi atendas, ke UEA siaflanke konigu

1. La nombron de siaj membroj.
2. Kion ekzakte reprezentas la personoj, kiuj de ok monatoj estas nomataj « Provizora Komitato », kaj kio estas ilia laŭstatuta pozicio.
3. Siajn celojn, kiujn ne klare montras la ĝis nun publikigitaj artikoloj.
4. Siajn precizajn proponojn.

IEL estas preta pritrakti tiujn proponojn kun plena bonvolo.

(Subskribis): L. Bastien, R. Bugge-Paulsen, J. Couteaux, H. W. Hetzel, B. E. Long, E. Malmgren, P. H. Mooij, A. C. Oliver, H. Steiner.

✱

Je la 21a horo, la IEL Komitato ricevis la jenan respondon:

Varsovio, 8an de Aŭgusto 1937.

Al Sinjoro Louis Bastien  
Prezidanto de IEL  
Varsovio.

Tre estimata sinjoro,

Konforme al la ĝenerala deziro de la esperantistoj, ke regu konkordo ni proponis al vi Sinjoro Generalo kunvenon por trovi la bazon de tia konkordo. Hieraŭ ni akceptis tiun ĉi iniciaton, sed hodiaŭ vi transdonas al ni demandaron skribe respondotan.

Via nuna paŝo certe ne helpas al la efektiveco de la deziro esperantista, tiom klare montrita dum la Malferma Kunveno. Ni havas la netan impreson ke vi intencas eviti ĉian diskuton. Tamen pro la bono de la afero ni respondas al vi, kvankam ne estas dignoplena procedo tuŝi situacion kiu estis kreita de vi mem.

Ni informas vin do:

Punkto 1: La Centra Kaso de UEA notis ĝis fino de Julio 1937 1200 anojn.

Punkto 2: La jura situacio de la Prov. Komitato de UEA estas al vi bone konata. Vi transdonis la ŝlosilojn de la Oficejo al la protestintoj, rekonis do ilian faktan rajton kaj povon agi laŭ la cirkonstancoj. Vi bone scias, ke la Prov. Komitato laboras laŭ art. 14 de la Svisa Kodo. Cetere ĝi estas rekonita kiel agadrajta de la leĝaj povoj en Genève.

Punkto 3: La celo de UEA estas konata. Ĝi troviĝas en la statuto de 1934 kiu validas.

Punkto 4: Vi deziras koni niajn proponojn. Ni deziras unue ke regu klara situacio inter ni ambaŭ, kaj ke oni lasu al UEA liberecon de agado. El tiuj du premisoj, necesaj kondiĉoj por konkordo ĉio alia facile solviĝos se ekzistas la sama bona volo je via flanko.

Respondinte viajn demandojn ni niavice demandas vin sekvante vian procedon. Tiel ni ne alvenos je fino. Nome ni deziras scii ĝis morgaŭ tagmeze (9 Aŭg. 37) 12a horo.

1. Kiam vi intencas repagi al UEA la sumojn deprenitajn kiuj servis por fondi vian Ligon?

2. Ĉu kaj kiam tri reprezentantoj de via Komitato estas pretaj kunsidi kun tri reprezentantoj de UEA kaj unu plia persono ekster la ambaŭ organizaĵoj por trovi eblecon efektiviĝi la deziron esprimitan de la esperantistoj.

3. Vi konas la situacion de UEA. Ni nun deziras scii la staton de via Ligo, precize el kiuj rimedoj vi povis egaligi la gravan diferencan inter normala nombro de anoj (stato de UEA en 1936) kaj la nuna nombro de **pagintaj** anoj de via Ligo, notinde malpli alta ol UEA kalkulis pasintjare.

Universala Esperanto-Asocio

Provizora Komitato

(Subskribis): K. M. Liniger, prezidanto,  
H. Kürsteiner, komitatano.

✱

La sekvantan tagon, la 9an de Aŭgusto, la Komitato de IEL denove kunsidis kaj pretigis la jenan respondon, senditan al la reprezentantoj de UEA je la 16a horo:

Varsovio, 9an de Aŭgusto 1937.

Estimataj samideanoj,

Ni ricevis vian leteron de la 8a kaj dankas vin pro la tuja respondo al niaj demandoj. Ni ne nun detale komentas pri ili, sed devas atentigi vin, ke nia tria demando rilatis ne al la celoj de UEA, sed la celoj de ĝia provizora komitato pri solvo de la nuna organiza problemo.

Responde al viaj demandoj:

1. Ni ne uzis eĉ unu centimon de UEA mono por starigi IEL. La mono apartenanta al UEA estis en aparta bankkonto. Ni jam informis vin pri la sumo je via kredito, kiun ni estas pretaj repagi al vi.

La aliajn sumojn kiujn vi postulis, ni ne povas rekonii ĉar ili estas jam uzitaj sole por la bono de UEA mem kaj por ĝia administrado.

2. Ni estas pretaj akcepti vian proponon, ke tri reprezentantoj de IEL kunsidu kun tri reprezentantoj de UEA kaj unu plia « neŭtrala » persono. Por tiu lasta ni proponas D-ro Adam Zamenhof.

3. Ĉi kune detaloj pri nia membraro je Julio 31. La nombro en la nuna momento estas pli ol 10.000 kaj ankoraŭ restas kvin monatoj ĝis la fino de nia jaro, kiam la nombro certe kreskos je kelkaj pliaj miloj eĉ laŭ la cirkonstancoj. El tiu klare vidiĝas, ke IEL jam estas akceptita de la Esperantistaro kaj havas firman bazon.

Vi rimarkos laŭ la respondo al via dua demando, ke ni estas pretaj diskuti kun vi kun plena bonvolo iajn proponojn kiujn vi submetos por solvo de la nunaj malfacilaĵoj. Ni jam elektis niajn reprezentantojn.

Ni devas atentigi vin al la fakto, ke via respondo estas adresita al S-ro Bastien persone, kvankam la letero estis sendita al vi de nia Komitato. Ni petas, ke estonte vi adresu viajn leterojn al la Komitato de IEL.

La Komitato de IEL:

(Subskribis): L. Bastien, R. Bugge-Paulsen, J. Couteaux, H. W. Hetzel, B. E. Long, E. Malmgren, P. H. Mooij, A. C. Oliver, H. Steiner.

✱

La IEL Komitato elektis kiel siajn reprezentantojn sian Prezidanton kaj S-rojn Malmgren kaj Goldsmith.

En kunsido de la IEL Komitato je la 10a matene je la 10a de Aŭgusto, la Prezidanto raportis, ke D-ro Zamenhof konsentis akcepti la proponitan rolon. En la sama tago, je la 12a horo, IEL ricevis la sekvantan respondon:

Internacia Esperanto Ligo  
Komitata kunveno  
Varsovio

Warszawa, 10an de Aŭgusto 37.

Universala Esperanto Asocio.

Tre estimataj samideanoj,

ni dankas vin por via respondo al nia letero de la 9a kaj ni informas vin:

Pasintaj aferoj: la postuloj de UEA pri mono ne koncernas IEL-on, sed nur la estintan prezidanton de UEA G-lo Bastien, sole respondecan pri la ŝanĝoj en la havaĵo de UEA dum kaj antaŭ la decido de la Tribunalo. Ni ne deziras reveni je aferoj diskutitaj, ne povas rekonii nek akcepti la oferton fariton pri pago de kelkaj miloj da frankoj. Ni do mantenas nian postulon, jure pravigeblan kaj pravigitan.

La du vidpunktoj tiom diferencas ke interkonsento ne estos ebla. Ni tial estas devigataj transdoni la aferon al plua prilaboro al nia advokato.

Tamen ĉion konsiderante kaj ne dezirante sencele elspezi monon por proceso, ni estas pretaj iri paŝon renkonten. Sed ni tuj precizigu, ke ni neniel akceptas aŭ akceptos proponon tian kian vi faris.

Ni ripetas, ke pri tio ĉi ni rilatos nur kun Sinjoro Generalo Bastien.

.....

Kunveno: Konsentite. Bonvolu fiksi horon kaj komuniki al ni. Tamen in deziras, ke partoprenu la kunvenon kiu estas interkonsiliga, sinjoro Isbrücker kiel neŭtrala persono, pro lia kompetenteco en la materio kaj liaj provoj trovi solvon de la problemo.

Pri la proponoj kiujn ni havis ni preferas atendi ĝis la kunveno mem. Ne estas al ni, UEA faru tiajn. Ĝia konstitucio ekzistas, necesas nur regroupigi la perdiĝintajn anojn. Pri tio ni konigas nian opinion dum la kunveno.

Bonvolu akcepti niajn sincerajn salutojn.

UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO  
por la prov. kom.

(Subskribis): K. M. Liniger, H. Kürsteiner.

Ni uzis leterpaperon de la kongreso ne dispanante momente nian propran.

✱

Al tiu ĝi sendis la jenan respondon en la sama tago je la 16a horo:

10.8.1937  
Varsovio.

Universala Esperanto-Asocio  
Varsovio.

Tre estimataj samideanoj,

Ni danke ricevis vian respondon al nia letero de la 9-a. Ni informas vin, ke ni telefonis al D-ro Adam Zamenhof, Królewska 41, Varsovio, ke nia delegitaro vizitis lin hodiaŭ mardon, je la 18.30. Tiu delegitaro konsistis el S-roj Bastien, Malmgren kaj Goldsmith. Ni petas, ke

vi bonvolu elekti tri personojn por reprezenti UEA en tiu kunveno, tiamaniere, ke ĉeestos la sep personoj de vi proponitaj. Ni intencas proponi ke D-ro Zamenhof prezidu la kunvenon.

Ĉar S-ro D-ro Adam Zamenhof estas la neŭtrala personon, kiun ni ambaŭ bezonas, nia Komitato opinias, ke ne estas utile havi alian neŭtralan personon; sed ĝi vidas nenium malhelpon, ke vi elektu S-ron Isbrücker inter la reprezentantoj de UEA.

Kun plej sinceraj salutoj,  
La Komitato de IEL.

(Subskribis): L. Bastien, R. Bugge-Paulsen, J. Couteaux, H. W. Hetzel, B. E. Long, E. Malmgren, P. H. Mooij, A. C. Oliver, H. Steiner.

✱

En la sama kunsido de la Komitato, la ĉeestantaj komitatanoj akceptis kaj subskribis la jenan rezolucion kaj sendis kopion al la Provizora Komitato de UEA:

« La Komitato de Internacia Esperanto-Ligo konsistanta el la samaj personoj kiel la antaŭa Komitato de Universala Esperanto-Asocio per ĉi tiu rezolucio atentigas la Provizoran Komitato de UEA, ke ĉiuj decidoj pri elspezoj faritaj en 1936 en Genevo kaj Londono, estis faritaj ne de la Prezidanto sola, sed de la Komitato aŭ Estraro laŭ la kutima maniero. »

✱

La aranĝita kunveno okazis ĉe la domo de D-ro Adam Zamenhof je la 10a de Aŭgusto 1937 je la 18.30. Jen la protokolo de la kunveno:

Ĉeestis: D-ro Adam Zamenhof flanke de UEA: S-roj Liniger, Kürsteiner, Jakob; flanke de IEL: S-roj Bastien, Malmgren, Goldsmith.

D-ro Zamenhof faris enkondukan paroladon kaj poste donis la parolon al IEL.

S-ro Bastien diris, ke ni bezonas daŭran solvon. La sperto montras, ke la monrimedoj de la Esperantistaro en la nuna momento povas vivi nur unu Centran Asocion. Li aldonis, ke li estas preta ekŝigi se tiu ekŝigo povas faciligi la unuecon.

S-ro Jakob diris, ke li tute konsentas pri la financa konstato de S-ro Bastien. Li diris, ke laŭ la nuna stato UEA povas vivi nur du jarojn aŭ eble unu. Ni revenu al la stato antaŭ Helsinko. Ni formu transiran komitaton, kiu trovu rimedon por reveni al tiu stato.

S-ro Goldsmith diris, ke IEL povas vivi kontentige. Se ni revenus al tiu stato de antaŭ Helsinko denove estus senĉesaj konfliktoj.

S-ro Malmgren sugestis, ke UEA povas fariĝi ia idea unuiĝo, eĉ en la kadro de IEL, kiu estus la internacia organizaĵo.

S-ro Jakob diris, ke tio ne estas solvo.

S-ro Malmgren: « Ĉu vi tute ne volas ŝanĝi la statuton de UEA por akceli la pacon? »

S-ro Jakob: « Ne, ĉar ni ne deziras labori kun la 50centima kotizo, kaj ni volas ke la Aktivaj Membroj elektu la Deleĝitojn. »

S-ro Bastien: « La simplaj membroj estas gravaj je morala vidpunkto por la movado. » Li apogas la proponon de S-ro Malmgren kaj diras ĉu UEA ne povas esti ia idea asocio.

S-ro Jakob respondis ke neeble.

S-ro Liniger: « Ĉie regas la deziro, ke UEA estu la asocio de individuaj membroj kaj IEL de la Landaj Asocioj. Redonu al ni niajn deleĝitojn. Ni ne ŝanĝu nian Statuton. Plie, ni restu en Genevo. Kiam IEL pagos sian ŝuldon al UEA? »

D-ro Zamenhof respondis: « Tiu demando koncernas teknikan aferon, ne la esencon de la problemo. »

S-ro Malmgren: « UEA varbu kiel ĝi volas sed ne la membrojn de IEL kaj reciproke. Ni ne devas batali inter ni. »

S-ro Jakob: « Intenco bona, sed ĝi ne solvas la problemon, ĉar ĉiam estos konkurenco. »

S-ro Kürsteiner: « UEA havas priorecon por la deleĝitoj. IEL-deleĝitoj estu nur por propagando. »

D-ro Zamenhof: « Mi konstatas, ke el ambaŭ flankoj oni diras, ke devas esti nur unu organizaĵo kaj ne du. Do, unu organizaĵo laboru en la kadro de la alia. Oni dividu la rolojn. Mi proponas ke estu nur unu titolo UEA kun du apartaj oficejoj en Genevo kaj Londono. »

S-ro Goldsmith proponis apartajn kunsidojn por diskutado. Tion oni faris dum proksimume duonhoro.

Post reveno en la saman ĉambron S-ro Bastien faris la jenan proponon en la nomo de la IEL komisiono sub rezervo de aprobo de la Komitato:

**a. Estu nur unu internacia organizaĵo kun nomo UEA aŭ IEL.**

**b. La centra oficejo estu en Londono, kun filia oficejo en Genevo, kiun estros S-ro Jakob. Tiu ĉi zorgos ekzemple pri propagando, ŝlosiloj, la biblioteko, kaj aliaj taskoj. S-ro Malmgren estas preta, por helpi al paciĝo, rezigni la rolon, kiun li jam komencis, zorgante pri la propagandaj aferoj.**

**c. La nuna provizora komitato de UEA estu reprezentata en la Komitato de la nova organizaĵo, por montri, ke estas kunfandiĝo kaj ne ensorbo.**

S-ro Kürsteiner proponis novan kunsidon de la komisiono kaj intertempe ili konsideros la proponon.

S-ro Bastien dankas al D-ro Zamenhof pro lia afableco.

(Subskribita): Adam Zamenhof.

La propono farita en tiu kunveno al la reprezentantoj de UEA estas legita al la Komitatanoj de IEL la saman vesperon je la 22a horo kaj la Komitato aprobis ĝin.

✱

Je la 12a de Aŭgusto, je la 14.10, la Prezidanto ricevis la jenan respondon:

Varsovio, la 12an de Aŭgusto 1937.

AL INTERNACIA ESPERANTO-LIGO  
Kunveno en VARSOVIO.

Tre estimataj samideanoj, per tio ĉi ni havas la honoron submeti al vi proponon de UEA sur la bazo de la propono de D-ro Adam Zamenhof. Ni dankus vin, se vi bonvolis ĝin studi kaj informi nin pri kunveno dum kiu ni diskutu la temon.

Ni prezentas al vi, tre estimataj samideanoj, niajn korajn salutojn.

La Reprezentantoj de UEA:

(Subskribis): K.M. Liniger, H. Kürsteiner, Hans Jakob, Prezidanto de la Membro de la Administranto Prov. Komitato. Prov. Kom.

**Propono de Universala Esperanto Asocio pri Unuecigo de la Esperanto Movado:**

La ĝenerala deziro de la Esperantistoj, kiel montras diversaj publikaj deklaroj de esp. organizaĵoj kaj plej elokvente la elkrioj dum la malfermo de la jubilea kongreso estas unuecigo de la Tuta movado neŭtrala. Sek-

vante tiun ĉi deziron (kaj premon) tri reprezentantoj de UEA kaj tri de IEL kunsidis en la laborĉambro de la kreinto de Esperanto sub la prezido de ties filo D-ro Adam Zamenhof.

Post elmonro ambaŭflanka de la nuna situacio, du organizaĵoj kun sama statuto, estis prezentitaj diversaj ideoj, el kiuj tiu de D-ro Adam Zamenhof estas atentinda plene:

Reiri al la tradicia UEA kun du oficejoj. La reprezentantoj de UEA studintaj ĝin atente, opinias ke ĝi estas taŭga bazo por forigi la dualismon tute konservante tipajn trajtojn de la du branĉoj.

La aliaj proponoj estis:

1. Reveni al la stato de Helsinko. UEA unuflanke, Ligo de Landaj Asocioj aliflanke. Supera komitato kun reprezenta karaktero. (Propono de UEA)
2. Du organizaĵoj: IEL kiel ĝenerala kun sidejo en Rickmansworth. UEA — sekcio de IEL kun sidejo en Genevo kun aldonoj de diversaj taskoj ekzemple propagando. (Propono de IEL)

Tiuj du proponoj returnas la radon de la historio. Kaj estas tute certe, ke tion la Esperantistoj ne akceptos. Ili ne protestos, ili ne plendos, ili ne kritikos plu, sed ili ne plu aliĝos, kaj deflankiĝos de nia neŭtrala movado, sin turnante al pli interesaj kaj pli laŭtempaj formaĵoj.

Konsciante pri la graveco de la momento la reprezentantoj de UEA studis tre atente ĉiun eblecon kiu ne tuŝu la sentojn kaj kiu samtempe respondu al la realeco. Principe akceptante la proponon de D-ro Zamenhof ili prilarĝigas ĝin kaj proponas ĝin per la nuna teksto kiel plej taŭgan solvon.

Transiro.

La transiro al la reformita UEA okazu plej malfrue ĝis fino de la jaro. La Centra sidejo en Genevo troviĝos tiam en la estinta Palaco de la Ligo de Nacioj, proksime al ĉiuj internaciaj organizaĵoj, Ligo de Nacioj, Internacia Labora Oficejo, Ruĝa Kruco, ktp. La Palaco Wilson mem gastigas de nun la plimulton de la duonoficialaj kaj privataj organizaĵoj internaciaj.

La taskoj de la Centra Oficejo en Genevo restas la samaj kiel ĝis nun. La Oficejo de Rickmansworth estu filio kun la titolo

Oficejo por Sekcio de Eksteraj Aferoj de UEA.

Pri transdono de aktoj kaj materialo kiel pri la plenumotaj taskoj de tiu ĉi sekcio decidis la estonta Estraro de UEA.

Krom tiuj laboroj ampleksigontaj laŭ la cirkonstancoj, la Filio de Rickmansworth servas kiel Teritoria Brita, kolektante la kotizojn de la individuaj membroj en Britujo.

Al paco interesperantista  
per unueco organiza

.....

Proponoj Ĝeneralaj

Universala Esperanto Asocio estas la sola organizaĵo neŭtrala esperantista.

Ĝia jura bazo estas la statuto de 1934 laŭ la Interkonsento de Kolonjo, kun kelkaj ŝanĝoj, laŭ la sperto faritaj dum la lastaj du jaroj.

La Centro estas en Genevo, kun filio en Rickmansworth apud Londono.

Strukturo

La strukturo de UEA estu tia, ke ĝi permesas akcepton de ĉiuj — escepte de organizaĵoj kun nete politika celo —. Por atingi tiun ĉi celon necesas kompletigi la statuton. La ĉefaj kaj plej gravaj ŝanĝoj estas la jenaj:

1. Landaj asocioj kiuj aligas siajn membrojn (0.50 centimoj sv.) rajtas nomi komitatanojn por 500 ĝis mil membroj aligataj.



2. Ĉiuj **a k t i v a j** membroj de UEA (ankaŭ tiuj en landoj kiuj aligas siajn anojn) elektas komitatanojn laŭ internacia kunmetita listo, 300 anoj aktivaj u n u komitatanoj.
3. Landaj Asocioj kiuj ĝis nun **ne** povis partopreni la internacian organizaĵon pro diversaj kaŭzoj estas invitataj partopreni en la komitato — kun konsila voĉo. Laŭeble faciligoj pri la pago de la kotizo de 50 centimoj estas antaŭvidataj per nova sistemo kalkula (presigo de dokumentoj, akiro de premioj kontraŭ kotizoj).

Ekzistu nur esperantistoj samrangaj. Ĉiu honorinda persono, ĉiu organizaĵo estu akceptata! El tiu rezultas:

1. Ne plu estu punkotizo por personoj kiuj ne apartenas al enlanda organizaĵo (laŭ la Interkonsento de Kolonjo, tiaj personoj devis pagi 50 % pli, se ili volas aliĝi al UEA).
2. En landoj kie ekzistas pluraj organizaĵoj kun landa karaktero, estas akceptataj ĉiuj. Devas esti trovata inter tiaj Landaj Asocioj, ia interna aranĝo laŭ la devizo: Marŝi disigite, bati kune.
3. Estas principe konsentata loko kun konsila voĉo en la komitato de UEA al la fakaj societoj. La ĝisnunaj statutoj, intence aŭ ne, ne atentis pri la utilo de ĉi tiuj organizaĵoj, laborantaj kun malmultaj rimedoj sen sufiĉa m o r a l a apogo de la tuta movado. Al sama vico apartenas la subteno de la finance malfortaj Landaj Asocioj en oriento kaj sudo de Eŭropo al kiuj plia atento devos esti donota.

✱

Tiun leteron la Komitato de IEL konsideris je kunveno kiu komenciĝis en la sama tago je la 14.15. Oni tuj pretigis la jenan respondon kaj sendis ĝin al la reprezentantoj de UEA je la 16a horo kaj aranĝis ke okazu alia kunveno de la Komisiono ĉe la domo de D-ro Zamenhof je la 18.30:

Varsovio, 12 Aŭgusto 1937.

Al la Provizora Komitato de UEA en Varsovio.

Tre estimataj samideanoj,

Ricevinte vian respondon ni bedaŭre devas konstati, ke vi ne bone komprenis la proponon, kiun ni faris en la kunsido de la 10a. Tiu propono estis:

- a) estu nur unu internacia organizaĵo kun nomo UEA aŭ IEL,
- b) la Centra Oficejo estu en Londono kun filia oficejo en Ĝenevo, kiun estros S-ro Jakob. Tiu ĉi zorgos ekzemple pri propagando, ŝlosiloj, biblioteko, ktp. S-ro Malmgren estas preta, por helpi al paciĝo, rezigni la rolon, kiun li jam kometis, zorgante pri la propagandaj aferoj.
- c) la nuna Provizora Komitato de UEA estu reprezentata en la Komitato de la nova organizaĵo por montri, ke estas kunfandiĝo kaj ne ensorbado.

Vi proponas:

- a) Unu internacia organizaĵo neŭtrala UEA.
- b) La Centro en Ĝenevo kun filio en Londono.
- c) La landaj asocioj ne estas membroj de la organizaĵo, sed nur rajtas aligi siajn membrojn.

Nia respondo:

- a) Konsentite.
- b) IEL estas organizaĵo, kiu post malpli ol unu jaro nun havas pli ol 10.000 membrojn, el kiuj 2700 estas individuaj membroj. Dume UEA laŭ sia lasta oficiala informo havas nur 1200. Tamen IEL ne entuziasme prenis sur sin, konsenti oficejon

en Ĝenevo, kiu kostos al ĝi monon, nur por ebligi la pacon kaj kontentigi per tio viajn aspirilojn. Sed la Centra Oficejo devas resti en Londono.

- c) Neniam plu la landaj asocioj konsentos ne esti esenca parto de la Centra Organizaĵo.

Ni do devas manteni la proponojn, kiujn ni faris antaŭ du tagoj. Ni atentigas vin, ke por la bono de Esperanto nia Komisiono faris jam en la unua kunveno la maksimumajn cedojn, kiujn ni povas prirrespondi antaŭ niaj elektintoj.

Kun samideanaj salutoj,

(Subskribis): L. Bastien, R. Bugge-Paulsen, J. Couteaux, H. W. Hetsel, B.E. Long, E. Malmgren, P.H. Mooij, A.C. Oliver, H. Steiner.

Je la citita horo la IEL-representantoj ĉeestis la domon de D-ro Zamenhof kiu informis ilin, ke la reprezentantoj de UEA ne povis vidi ian eblecon pri interkonsento kaj pro tio ne volis ĉeesti.

✱

La sekvantan tagon, la 13an de Aŭgusto, dum kunsido de la Komitato de IEL, kiu komenciĝis je la 10a matene, la Prezidanto raportis, ke D-ro Zamenhof petas, ke la membroj de la Komisiono ĉeestu kunsidon kun la reprezentantoj de UEA je la 12.30 por intertrakti la pluan sintenadon ambaŭflanke. La Komitato do, post konsidero de la afero, faris la jenajn decidojn por indiki sian sintenadon:

1. IEL promesas ne ataki UEA kondiĉe ke UEA ne ataku IEL.
2. IEL rigardas kiun ajn atakon kontraŭ gvidanto de IEL, ĉu en gazetoj aŭ cirkuleroj aŭ ĉu publike, kiel atakon kontraŭ la Ligo.
3. Kompreneble ambaŭ asocioj havas la rajton informi objektivite siajn membrojn pri la okazintaĵoj dum la Varsovia Kongreso.

✱

Protokolo de kunveno ĉe la Varsovia Kongreso, je la 13a de Aŭgusto 1937, je la 12.30:

Prezidis: D-ro Zamenhof.

Ĉeestis: flanke de UEA — S-roj Liniger, Kürsteiner, Jakob.  
flanke de IEL — S-roj Bastien, Malmgren, Goldsmith.

S-ro Goldsmith legis la protokolon de la kunsido je la 10a de Aŭgusto kaj post unu du etaj aliigoj ĝi estas interkonsentita por posta subskribo.

D-ro Zamenhof diris, ke li tre bedaŭris ke kunfandiĝo ne pruviĝis ebla, sed li esperis, ke almenaŭ estu ebleco pri kunagado. Li sugestis, ke oni povus paroli pri la jenaj tri eblecoj:

1. Ĉesigo de polemiko.
2. Organizo de nur unu internacia kongreso.
3. Pretigo de unu komuna jarlibro.

S-ro Goldsmith legis la decidon de la IEL Komitato kaj S-ro Jakob demandis: « Kio estas atako? ».

D-ro Zamenhof respondis, ke unu asocio ne diru publike ke la alia malbone agis aŭ agas.

S-ro Jakob diris, ke la Provizora Komitato de UEA jam decidis ne plu publikigi ion pri pasintaĵoj, sed li parolis pri la jura respondeco de la Prezidanto de IEL. S-ro Jakob proponis « ke ambaŭ asocioj opinias, ke publika diskutado pri pasintaj aferoj en formo polemika malutilas al la movado kaj ambaŭ interkonsentas eviti ĉion kio povas esti konsiderata kiel ofendo al la alia. »

La propono estas unuvoĉe akceptita sub rezervo de aprobo de la du Komitatoj.

La tria punkto en la rezolucio de la IEL Komitato estas ambaŭflanke akceptita.

La membroj de la Komisiono tiam diskutis pri la ebleco okazigi nur unu internacian kongreson.

S-ro Jakob proponis, « ke ambaŭ organizaĵoj, UEA kaj IEL, interkonsentas, ke la jara manifestacio de la Esperantistaro estu afero inter ambaŭ.

1. Ĝi konservu la nomon: Universala Kongreso de Esperanto.
2. Pri la licencpago decidus interkonsente ambaŭ organizaĵoj.
3. Ambaŭ organizaĵoj faros sian eblon por ke la Universala Kongreso estu bone vizitata.
4. En la kongres-estraro estu reprezentanto de ambaŭ organizaĵoj.

La reprezentantoj de UEA tiam proponis al Svisa Esperanto-Societo, ke ĝi konservu la inviton de la Svisa Registaro por 1939. UEA siaflanke subtenos la kongreson en Londono per ĉiuj rimedoj. Pri la kongreso en 1939 estos speciala interkonsento. »

La reprezentantoj de IEL respondis, ke pri tiuj proponoj ili devas interkonsenti kun la Komitato.

(Subskribita): A. Zamenhof.

✱

Komitata kunsido de IEL, je la 13a de Aŭg. 1937, je la 14.40:

La sekretario de IEL raportis pri la okazintaĵoj dum la kunsido de la Komisiono. Post zorga konsidero la Komitato unuanime akceptis la jenan rezolucion:

« La Komitato kun bedaŭro konstatas, ke ĝi ne povas fari aranĝojn pri kunlaborado kun asocio kiu samtempe minacas sian prezidanton pri leĝa proceso, sed ĝi denove faras la proponon pri kiu ĝi decidis en sia kunsido de la 13a de Aŭgusto je la 10a horo. »

✱

Protokolo de kunsido de la Komisiono ĉe la Varsovia Kongresejo je la 13a de Aŭgusto je la 19a horo:

Prezidis: D-ro Adam Zamenhof.

Ĝeestis: flanke de UEA — S-roj Liniger, Kürsteiner, Jakob  
flanke de IEL — S-roj Bastien, Malmgren, Goldsmith.

S-ro Goldsmith legis la lastan decidon de la IEL Komitato.

D-ro Zamenhof esprimis bedaŭron, ke la unuecigo renkontas tiom da malfacilaĵoj, sed tamen konstatas, ke estas interkonsento pri ĉesigo de polemikoj.

S-ro Jakob diris ke jes, sed nur post klareco de la pasintaĵoj.

S-ro Liniger diris, ke temas pri la mono, kiun UEA postulas de S-ro Bastien.

D-ro Zamenhof diris, ke li estas tute neŭtrala en la afero, sed petas ne tuŝi la pasintaĵojn. Se tiu demando starigus, li devus demeti sian postenon.

S-ro Jakob demandas ĉu S-ro Bastien rilatos nun kun S-ro Liniger por solvi la postulan demandon kaj S-ro Bastien respondis, ke neniam li estis ricevinta la precizan ciferon.

D-ro Zamenhof rememorigas sian enkondukan paroladon, kaj deklaras ke se oni daŭros paroli pri tiu punkto, li demetos sian funkcion kaj fermos la kunsidon, ĉar li ne sentas sin kompetenta en komercaj aferoj.

S-ro Jakob cedis pri la punkto.  
D-ro Zamenhof demandis ĉu la interkonsento pri ĉeso de polemiko validas.

S-ro Jakob respondis, ke en la intereso de la paco, ili ne diskutos pri la pasinteco en la ferma kunsido.

Post multe da argumentado estas decidita, ke D-ro Zamenhof faru deklaron en la f. ma



kunsido de la kongreso pri la decido farita.  
La ĉeestantoj tiam diskutis pri la ebleco aranĝi nur unu internacian kongreson. Pri tiu punkto S-ro Jakob postulis minimume:

1. La Kongreso 1938 en Londono kaj tiu de 1939 en Bern.
2. La du kongresoj estu organizitaj de IEL kaj UEA kune.
3. Ke UEA ricevu certan parton de la licenc-pago kaj li sugestis 2/5.

(Subskribita): Adam Zamenhof.

\*

En kunsido de la Komitato de IEL kiu okazis je la 13a de Aŭgusto 1937 je la 23a horo, estis decidite unuanime ke IEL aranĝos la kongreson en Londono en 1938 kaj estas preta tion fari en Bern en 1939, sed ĝi ne povas akcepti la du aliajn kondiĉojn.

\*

Protokolo de kunsido de la Komisiono en la Varsovia Kongresejo je la 14a de Aŭgusto 1937, je la 9.15:

Prezidis: D-ro Adam Zamenhof.

Ĉeestis: flanke de UEA — S-roj Liniger, Kürsteiner, Jakob  
flanke de IEL — S-roj Bastien, Malmgren, Goldsmith.

D-ro Zamenhof petis ĉu la reprezentantoj de UEA estas pretaj subskribi la protokolon de la unua kunsido de la Komisiono.

S-ro Jakob respondis, ke ili ne subskribos ion, sed li aldonis, ke ili ne polemikos en la kongreso kaj en la gazeto. Ili ne plu parolos pri la pasintajtoj.

S-ro Bastien: « Resume vi rifuzas subskribi la protokolon? ».

S-ro Jakob: « Ni ne plu parolu pri tekstoj. D-ro Zamenhof povas subskribi la protokolon de la unua kunveno. »

D-ro Zamenhof: « Notu, ke la reprezentantoj de UEA konsentas pri la teksto de la protokolo, sed rifuzas subskribi ĝin. »

S-ro Jakob: « UEA konsentas nenion plu publikigi en polemika formo pri la pasintajtoj. (Decido de la Provizora Komitato de UEA je Majo 1937). Pro la faritaj spertoj la reprezentantoj de UEA en Varsovio ne deziras subskribi la protokolon, sed konsentas pri ĝia enhavo. »

S-ro Bastien: « Tio indikas, ke la gvidantoj de UEA kulpigas la gvidantojn de IEL pro spertoj faritaj en 1936-1937, sed tio ne estas fakto, ĉar S-ro Jakob parolis pri la Interkonsento de Kolonjo. »

D-ro Zamenhof: « Vi estas prava. »

S-ro Jakob: « Ni aldonu „ Pro la faritaj spertoj post la Interkonsento de Kolonjo “. Ĉu vi intencas publikigi tion? »

D-ro Zamenhof: « Mi pensas, ke tio estas necesa. »

S-ro Goldsmith raportis pri la decido de la Komitato de IEL rilate al la kongresoj.

S-ro Jakob: « Tio finas la kunvenon ĉar ni ne plu povas diskuti en tiaj kondiĉoj. »

La reprezentantoj de UEA forlasis la ĉambron.

(Subskribita): Adam Zamenhof.

## La kontraŭuloj asertas

**ke Esperanto neniam venkos. La samon asertis la malprogresuloj pri aliaj gravaj inventoj, ekz. fervojo, aviado. Ĉi-lastaj konkeris la mondon. Ankaŭ la internacia helplingvo ĝin konkeros. Kontraŭ la stultaj asertoj de l' malprogresuloj ni starigu nian firman: KAJ ĜI VENKOS TAMEN!**

## Esperanton en Lernejon!

### Rezolucio de TAGE pri la enkonduko de Esperanto en lernejojn, proponita al la Ferma Kunsido de la Jubilea Kongreso, kaj unuvoĉe akceptita de la Kongreso.

Konsiderante unue, ke la solvo de la problemo de unu helpa facila lingvo internacia en la epoko de la aviado, de la radio kaj de la filmo sona por ĉiuj internaciaj rilatoj estas ĉiam pli kaj pli urĝa, kiel interalie provas la lasttempa propono de senatano Macartney Abbott, aprobita de la aŭstralia federala senato, pri la kunvoko de speciala Interŝtata Konferenco;

konsiderante due, ke la sola praktika solvo de tiu ĉi problemo, kiu jam grandparte fakte aŭtomate efektiviĝas, estas ne nur laŭ la kompetentaj lingvistoj, sed ankaŭ laŭ la raporto de la sekretariejo de la Ligo de Nacioj de 1922, la artefarita lingvo Esperanto, kreita en 1887 de pola kuracisto D-ro Ludoviko Lazaro Zamenhof, — lingvo, kiu de la simpla projekto dum apenaŭ duonjarcento fariĝis granda socia movado, laŭ kultura vidpunkto kaj vere neŭtrala helpa lingvo vivanta, uzata en ĉiuj landoj de miloj kaj miloj de laŭvolaj adeptoj por diversaj sciencaj, profesiaj, ideaj, politikaj, religiaj kaj aliaj celoj, tiel politike neŭtrala, teknike perfekta faciliga rimedo de la interkompreniĝo inter la popoloj de ĉiuj kontinentoj;

konsiderante trie, ke la literaturo kaj la gazetaro en tiu ĉi lingvo ĉiam pliriĉiĝas kaj servas al ĉiuj celoj, ke samtempe la teknika vortaro ĉiufanke ellaborita estas jam pli riĉa ol en multaj eŭropaj lingvoj;

konsiderante kvare, ke Esperanto donas lingvan egalrajtecon al ĉiuj nacioj en la internaciaj traktadoj;

konsiderante kvine, ke en multaj internaciaj organizaĵoj (institutoj, kongresoj, oficejoj, foiroj), eĉ en oficialaj, kiel Internacia Oficejo de Laboro, Esperanto fariĝis jam fakte en uzado laŭvice kvara aŭ kvina internacia lingvo apud la franca, la angla, la hispana kaj la germana, ĉiam kiel lingvo preferata de la larĝaj amasoj kaj plej korekte uzata el ĉiuj lingvoj;

konsiderante ses, ke en multaj landoj ekzistas jam pli aŭ malpli grandaj kadroj de instruistoj necesaj por instrui la lingvon en la lernejoj;

konsiderante sepe, ke en la landoj, kie la nombro de instruistoj ne sufiĉas, oni aplikas sukcese lasttempe la rektan metodon de pastro Cseh, laŭ kiu instruas la lingvon fremdaj instruistoj;

konsiderante oke, ke en multaj lernejoj la lingvo estas instruata ne nur fakultative, sed devige, kaj ke eĉ la plej malriĉa infano povas lerni ĝin;

konsiderante naŭe, ke multaj ŝtatoj helpas kaj subvencias tiun instruadon, rekonante la grandan signifon, kiun Esperanto povas havi el la vidpunkto de la nacia intereso;

la Kongreso, sankciante la decidon de la Pariza Konferenco pri Esperanto en la Moderna Vivo, kiu postulis la enkondukon de Esperanto en la lernejojn, decidis siaflanke sin turni al ĉiuj registaroj de la mondo kun la peto kaj alvoko, ke ili bonvolu aliĝi al la Interŝtata Esperanta Akordo pri la deviga enkonduko de Esperanto en la lernejojn kaj ke ĉiu ŝtato donu promeson enkonduki instruadon de Esperanto, se almenaŭ entute ses ŝtatoj donus la saman promeson. La Kongreso konsideras la proponatan de D-ro Czubrynski Interŝtatan Traktaton, kiel plej praktikan vojon por ĝeneraligi lernadon de Esperanto.

La Kongreso rajtigas sian Lokan Organizan Komitaton funkcii kiel la Realiga Komitato de la Kongreso kaj komisiis al ĝi informi la registarojn pri la laboroj kaj la rezolucioj de la Kongreso.

La vagonarveturintaj gesamideanoj bone alvenis en Bjalistoko. Antaŭ la stacidomo nin akceptis orkestro per bona ludado de la himno. La reprezentanto de l' urbestro salutis per afablaj trafaj vortoj. Dum la enaŭtobusiĝo eksonis gajaj melodioj.

Baldaŭ ni atingis la tiel sopire deziritan celon: la naskiĝdomon de D-ro Zamenhof.

Ligna, malnova domo. Okupita de malriĉuloj. En la supra triĉambra loĝejo subtegmenta naskiĝis nia majstro. Enskribinte nin en la memrorlibron, ni eliras.

Ĉie, en la domo, surstrate, kiom da malriĉegaj, mizeraspektaj, ĉifonvestitaj homoj! Similaj bildoj en la Zamenhof-strato en Varsovio. En kia malriĉa ĉirkaŭaĵo naskiĝis nia glora majstro! Sub kiuj malfavoraj cirkonstancoj la bonkora saĝulo ellaboris sian nemorteman verkon! Vidinte tiom da mizero, ĉies koro ek-sentis doloron, kaj antaŭ ĉies memoro en glorieco ekaperis la granda geniulo, la nekomparebla bonfaranto de la homaro!

Neforgeseblaj rememoroj. Se nia amo, estimo kaj fideleco al lia verko kaj al li povus esti plialtigata, tiam en ĉi tiuj lokoj tio nepre okazus.

La urbestro kun la estraro inde akceptis la pilgrimantojn. Granda bildo de Zamenhof, la verda standardo kaj ĝardeno da belegaj floroj ornamis la estradon. La urbestro per simplaj, elkoraj vortoj nin salutis kaj per vere pola gastamo nin regalis kaj kun ĉiuj parolis.

Ankaŭ mi havis la honoron paroli kun li, kaj precipe kun la urba ĉefingenierno. Mian proponon, aĉeti kaj konservi la naskiĝdomon de Zamenhof, kiel ĉiaman muzeon por la estontaj generacioj, ni detale priparolis, kaj el la vortoj kaj rimarkoj de la kompetenta urbestro mi konkludas, ke li simpatie kaj eble eĉ favore inklinas al mia propono.

La realigo dependas de ni, esperantistoj. Ni devus kolekti la necesan monon, por ke kun la helpo morala kaj materia de la urbestro ni estu la posedantoj kaj la urbo la konservanto de ĉi tiu por Esperanto plej grava monumento.

Julius Glück.

## Komuniko

### de la Loka Kongresa Komitato de la 29a Universala Jubilea Kongreso.

« Ora Libro ». Kongresanoj, kiuj ne ricevis la « Oran Libron », estas petataj tuj informi LKK. Sendu la precizajn adresojn, kaj 2 respondkuponon por kovri la poŝtelspezojn!

Kongresaj dokumentoj. Samideanoj, kiuj ne povis partopreni la Universalan Kongreson en Varsovio kaj volas ricevi ĉiujn kongresajn dokumentojn (1800 gr.), bonvolu sendi 7 respondkuponon aŭ egalvaloron por kovri la poŝtelspezojn! Al la helpkongresanoj ni mem sendos.

« La Jubilea ». Volonte ni sendos al ĉiu 7 numerojn de la oficiala gazeto de la 29a Universala Kongreso « La Jubilea » kontraŭ 2 respondkuponoj.

Memorajoj el Varsovio. Restis 32 serioj po 10 fotografiaĵoj de Varsovio kun Esperanta surpreso. Volonte ni sendos serion por 2 respondkuponoj.

Broŝuroj pri Varsovio, Krakovo, Vilno, Gdynia. Al ĉiu ni volonte sendos la broŝurojn. Nur ne forgesu aldoni 1 respondkuponon por kovri niajn poŝtelspezojn!

« Literatura Mondo ». Baldaŭ ni komencos dissendi kiel memoraĵon pri la Kongreso la polan numeron de « Literatura Mondo ».

Mantelo. Iu sinjorino forgesis en la Akceptejo mantelon. Kiu?

Danko. LKK plej kore dankas al ĉiuj, kiuj helpis en la aranĝoj, laboroj de la Kongreso kaj partoprenis ĝin.

# Internacia Esperanto - Ligo

Centra Oficejo: Heronsgate, Rickmansworth, (Herts.), Anglujo.

## Oficiala Informilo

**N-ro 44. 28-an de Aŭgusto, 1937.**

### ESTRARO.

Per voĉdonado de la Komitato en Julio elektigis kiel Estraranoj de IEL:  
D-ro P. Kempeneers, Belgujo.  
S-ro A. C. Oliver, Britujo.

### SUPLEMENTO AL LA JARLIBRO.

La Centra Oficejo nun pretigas la Suplementon. Ĝi aperos en la komenco de Oktobro kaj estos sendata al ĉiu Individua Membro kiu pagis la kotizon por 1937.

### BULGARA ĈEFDELEGITO.

Bonvolu noti, ke la Ĉefdelegito, S-ro I. Kotov, forestas ĝis la fino de 1937. Intertempe oni sin turnu al S-ro S. Radev, str. Belograd-ĉik 5, Ruse, Bulgarujo.

### NOVAJ DELEGITOJ.

#### Britujo.

**Buckhurst Hill** (Essex). — D: F-ino M. Cripps, 21, Roding View.

**Flixton** (Lancashire). — D: W. B. Currie, 7, Wyndcliff Avenue, Flixton, near Manchester.

**Paignton** (Devonshire). — D: C. W. Tubb, 13, Higher Polsham Road.

**Torquay** (Devonshire). — Nova D. — vidu D. por Paignton.

#### Ĉeĥoslovakujo.

**Karlsbad** (Bohemio). — VD: B. R. Zeiner. Morgenzeile 743, domo « Chicago ».

#### Hispanujo.

**Callosa Ensariá** (Alicante). — D: V. Perles Moncho, Calle de Garcíá Hernández 11.

#### Islando.

**Hvammstanga** (Húnavatnssýsla). — D: B. P. Blöndal, poŝtestro.

#### Latvujo.

**Riga**. — D: T. Arbergs, Ives iela 4 - 2.

#### Maroko.

**Fez**. — D: Pierre Faivre-Duboz, Ourtzagh-Fez. (Ĝis 10.10.1937 en Chabat-Fez.)

C. C. GOLDSMITH,  
Ĝenerala Sekretario.

### SANĜOJ.

#### Britujo.

**London**. — FD. (Turismo): Nova adreso: M.M. Du Merton, 97, The Woodlands, Beulah Hill, London, S.E. 19.

#### Nederlandindio.

**Cheribon** (Java). — D: K. Gorter, Soekalilan 14.

**Soerakarta**. — Provizore ne plu estas D.

#### Portugalujo.

**Aljustrel**. — Provizore ne plu estas D.

#### Usono.

**Bozeman**. — Provizore ne plu estas D.

### SUBTENANTO.

Bonvolis aliĝi kiel Membro-Subtenanto:  
133. C.B. Morgan, Brightlingsea, Anglujo.

## INTERNACIA KONKURSO.

Stato je la 31-a de aŭgusto 1937.

### POENTOJ

	1935	1937	%
1. Norvegujo	120	480	400.0
2. Aŭstrujo	255	704	276,1
3. Grekujo	110	137	124.5
4. Hungarujo	490	569	116.1
5. Usono	1264	1382	109.3
6. Italujo	560	591	105.5
7. Britujo	6469	6127	94.7
8. Aŭstralio	470	419	89.1
9. Bulgarujo	75	65	86.7
10. Nov-Zelando	210	175	83.3
11. Belgujo	2081	1722	82.7
12. Svedujo	2984	2357	79.6
13. Azio	1615	1259	77.9
14. Portugalujo	395	297	75.2
15. Kanado	100	74	74.0
16. Sud-Ameriko	1025	749	73.1
17. Francujo	7909	5594	70.7
18. Litovujo	150	105	70.0
19. Danujo	585	391	66.8
20. Ĉeĥoslovakujo	4040	2019	50.0
21. Nederlando	4815	2267	47.1
22. Polujo	685	278	40.6
23. Jugoslavujo	615	217	35.3
24. Afriko	395	127	32.2
25. Finnlando	195	61	31.3
26. Latvujo	265	55	20.8
27. Rumanujo	400	45	11.2
28. Svislando	1410	137	9.7
29. Hispanujo	2080	15	0.7
30. Estonujo	130	—	—
<b>Sumo</b>	<b>41897</b>	<b>28418</b>	<b>67.8</b>

Meza %

C. C. GOLDSMITH,  
Ĝenerala Sekretario

## Oficiala Informilo

**N-ro 46 10-an de Septembro 1937**

### NOVAJ DELEGITOJ.

#### Argentino.

**Avigdor** (Entre Rios). — D: K. Milkuschütz, Estacion Bovril.

**San Sorge** (Santa Fé). — D: L. Flury.

#### Norvegujo.

**Bergen** (Hordaland). — D: K. L. Offerdal, Konvalvei 14.

#### Polujo.

**Biala Podlaska** (Lublino). — D: L. Stalewski, Urząd Skarbowy.

**Chelmo** (Pomeranio). — D: K. Schreyer, Rynek 24.

**Lodz**. — D: J. Zys, ul. Radwanska 6.  
FD. (Komerco): La D.

#### Svedujo.

**Gävle** (Gästrikland). — D: G. Aström, Box 3007, Gävle 3.

**Tranas** (Smaland). — D: Y. Svensson, Storgatan 8.

### SANĜOJ.

**Bruxelles-Brussel**. — Provizore ne plu estas VD. prot ranslokiĝo.

#### Britujo.

**London**. — Provizore ne plu estas VD. en W.5. pro translokiĝo.

#### Svedujo.

**Lund**. — D: (Nova adreso): G. Laurin, Kung Oskarsväg. 9-B. (Post 1.10.37.)

### MONATA STATISTIKO.

#### Membraro.

Jen la stato de la pagitaj kotizoj ĝis la fino de Aŭgusto 1937:

Asociaj Membroj . . . . . 7812

Individuaj Membroj:

MJ . . . . .	1071
MA . . . . .	974
MAH . . . . .	243
MS . . . . .	133
Patronoj . . . . .	13
MD . . . . .	74
MH . . . . .	31
<b>Sumo</b>	<b>2539</b>

**10351** en 59 landoj

#### Korespondajoj.

Centra Oficejo (sen la gazetoj) dum Aŭgusto 1937:

Ricevitaj . . . . .	350
Senditaj . . . . .	310

**660**

C. C. GOLDSMITH,  
Ĝenerala Sekretario.

## Oficiala Informilo

**N-ro 47 17-an de Septembro, 1937**

### LANDA ASOCIO.

Jus aliĝis:  
Jugoslavia Esperanto-Ligo.

### FAKA ASOCIO.

Konsentis kunlabori laŭ Paragrafo 13 de la Staŭto: Skolta Esperantista Ligo.

### NOVA PERANTO.

#### Maroko.

S-ino I. Fink, 41, Boulevard Moulay Joussef, Casablanca.

### NOVA DELEGITO.

#### Aŭstrujo.

**Melk a. Donau** (N.Ö.). — D: K. Ehrenreich, Hotel Bahnhof.

### ADRESO-SANĜOJ.

#### Aŭstrujo.

**Wien**. — FD. (Vitro-arto): E. Weber, Gentsgasse 27, 1/8.

#### Britujo.

**Northampton**. — Pro translokiĝo provizore ne plu estas D.

#### Danujo.

**Fredericia**. — D: S. K. Nielsen, « Subriel », Havepladsvej.

C. C. GOLDSMITH,  
Ĝenerala Sekretario.

## Oficiala Informilo

**N-ro 45. 3-an de Septembro, 1937.**

### NOVAJ DELEGITOJ.

#### Aŭstralio.

**Hamilton** (Victoria). — D: F.S. Chamberlain, ĉe Radiostacio 3.H.A., The Age Broadcasting Service.

#### Hungarujo.

**Budafok**. — D: I. Pados, Antal u. 11.

**Pestujhely**. — D.: Geisler, Horthy Miklosne utca 34

# La dekmilo transpaŝita

Je la fino de aŭgusto IEL havis 10351 pagintajn membrojn en 59 landoj, nome 7812 asociajn kaj 2539 individuajn membrojn. Per tio estas transpaŝita la unua dekmilo. La rezulto povus ŝajni ne brila, se oni konsideras ke ni ĵus festis la 50-jaran ekzistadon de Esperanto. Sed fakte nia universala ligo, kiel IEL, laboras apenaŭ unu jaron, kaj konsiderante tion, oni povas esti eĉ tre kontenta pri la atingita rezulto. Envere ĝi estas nur la komenco, kaj la celo estas multoble pli granda. Laboru ĉiu fervore kaj diligente, por ke baldaŭ la dua dekmilo estu plena.

## Internacia Esperanto - Ligo

Membroj pagintaj ĝis la 31-a de aŭgusto 1937.

	AM	MJ	MA	MAH	MS	Pat.	DM	HM	Sumo
Acoroj	—	—	1	1	—	—	—	—	2
Angolo	—	—	1	—	—	—	—	—	1
Argentino	—	7	17	—	8	—	—	—	32
Aŭstralio	—	4	33	2	3	—	1	—	43
Aŭstrujo	175	41	30	2	—	—	1	1	250
Belgujo	347	29	95	15	6	—	3	1	496
Borneo	—	—	—	—	—	—	1	—	1
Brazilo	26	6	18	6	—	—	—	—	56
Britujo	1240	247	172	46	58	10	18	4	1795
Bulgarujo	—	7	3	—	—	—	—	—	10
Ĉeĥoslovakujo	400	94	75	27	5	—	2	1	604
Ĉinujo	—	—	4	—	—	—	—	—	4
Danujo	—	15	23	3	2	—	1	1	45
Egiptujo	—	5	3	—	—	—	1	—	9
Finnlando	—	1	2	3	—	—	—	—	6
Francujo	2362	231	149	15	14	3	13	11	2798
Germanujo	—	2	3	—	—	—	2	—	7
Gibraltaro	—	—	1	—	—	—	—	—	1
Grekujo	100	1	2	1	—	—	—	1	105
Havaja ins.	—	—	1	—	—	—	—	—	1
Hindoĉinujo	—	1	1	—	—	—	—	—	2
Hindujo	—	1	1	1	—	—	—	—	3
Hispanujo	—	1	1	—	—	—	2	1	5
Hongkongo	—	—	—	1	—	—	—	—	1
Hungarujo	100	19	23	12	—	—	1	2	157
Irano	—	1	—	—	1	—	—	—	2
Islando	—	—	2	—	—	—	—	—	2
Italujo	263	12	13	9	2	—	4	2	305
Japanujo	600	23	17	1	1	—	—	—	642
Jugoslavujo	—	5	12	6	—	—	—	—	23
Kanado	—	2	4	2	—	—	—	—	8
Kenja Kolonio	—	—	1	—	—	—	1	—	2
Kolombio	—	—	—	1	—	—	—	—	1
Latvujo	—	5	3	—	—	—	—	—	8
Lihtenŝtejno	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Litovujo	—	—	9	—	1	—	—	—	10
Luksemburgo	—	—	1	—	—	—	—	—	1
Madeiro	—	—	2	—	—	—	—	—	2
Maroko	—	1	—	1	—	—	—	—	2
Meksiko	—	—	1	—	—	—	—	—	1
Monako	—	4	1	—	—	—	—	—	5
Nederlandindio	—	2	9	2	2	—	—	—	15
Nederlando	700	99	58	26	12	—	3	—	898
Norvegujo	271	23	7	2	—	—	—	—	303
Nov-Zelando	—	22	5	—	1	—	2	—	31
Palestino	—	4	3	1	—	—	—	—	8
Papuo	—	—	—	—	—	—	2	—	2
Polujo	—	25	9	4	1	—	2	1	42
Portugalujo	—	2	17	5	1	—	1	—	26
Rodezio	—	—	2	—	—	—	—	—	2
Rumanujo	—	3	3	—	—	—	—	—	6
Sovet-Unio	—	—	1	—	—	—	1	—	2
Sud-Afriko	—	2	1	1	—	—	—	—	4
Svedujo	1151	75	54	23	1	—	1	1	1306
Svislando	—	4	4	1	4	—	4	1	18
Trinidado	—	—	—	1	—	—	—	—	1
Turkujo	—	1	—	1	—	—	1	—	3
Urugvajo	—	—	7	1	—	—	—	—	8
Usono	77	43	69	20	10	—	5	3	227

59 landoj . . . 7812 1071 974 243 133 13 74 31 10351

## Refoje Brazilo

Novaj brazilaj stratoj kun la nomoj Zamenhof kaj Esperanto.

La registaro de Brazilo, kiel sciante, jam de longe rigardas plej simpatie Esperanton. Ankaŭ stratoj kun nomoj, kiuj memorigas nian aferon, ekzistas en nia lando. Strato « Zamenhof » ekzistas en Rio-de-Janeiro, kaj stratojn « Esperanto » havas la ĉefurbo kaj Aracaju (en ŝtato Sergipe).

Antaŭ kelkaj tagoj Brazila Ligo Esperantista ricevis du ĝojigajn informojn: S-ro inĝ. Americano Costa, urbestro de S. Salvador, ĉefurbo de ŝtato Baía, aprobis proponon de l' Laborsekcio de la Urba Inĝenierarta Departemento, ke estu donata la nomo « Esperanto » al unu el la stratoj de tiu ĉefurbo. Same, la Magistrato de Pôrte Alegre, ĉefurbo de ŝtato Rio-Grande-do-Sul, aprobis leĝoproponon, ke estu nomata « Zamenhof » unu el la tieaj stratoj. Tiu decido estas prenita laŭ propono de l' urbestro mem de Pôrto Alegre, majoro Alberto Bins, instigita de la fervora samideano D-ro Benjamin Camozato, okaze de la 9a Brazila Kongreso de Esperanto.

## Opinioj de membroj de la Supra Domo de l' Japana Parlamento pri Esperanto

En la komenco de la nuna jaro, Societo por Subteno de Esperanto-Movado dissendis demandaron al ĉiuj membroj de la Supra Domo. Demando 1: Ĉu vi vidas neceson de lingvo internacia Esperanto en diversaj kampoj de internacia vivo, t.e. komerco, korespondado, interŝanĝo de kulturo, diplomatio ktp.? — Demando 2: Ĉu vi aprobas la instradon de Esperanto en mezgradaj lernejoj kiel tuton aŭ parton de leciono de fremdaj nacilingvoj?

El la ricevitaj 23 respondoj, respondis pri 1: jes : 14; ne : 2; kun rezervo : 2; pri 2: jes : 10; ne : 6; rezervo : 2. Pri ambaŭ demandoj 5 rezervis respondon. La neaj respondoj baziĝis sur miskoinpreno aŭ malvastanimaj pensoj, kiuj estas neatentindaj.

## Japana kultura revuo interesiĝas pri Esperanto.

« Nippon Gakugei Ŝinbun », kultura revuo aperanta tri fojojn monata, havas intereson pri la lingva problemo. Ĝi lastatempe starigis rubrikon « Lingvoproblemo », kaj la unuan fojon tie publikigis artikoleon de Mijake-Ŝ. pri Esperanto. Krom la japana titolo ĝi presis ankaŭ esperantlingvan: « La Japana Kultura Gazeto ». La redakcio tre volonte ricevas materialon pri eksterlanda kulturo per esperantlingva korespondado. Skribu al: « Nippon Gakugei Ŝinbun », Kasumigaseki Bild., 6 Uĉisaiŭai-ĉo 1, Kōhimaĉi, Tokio, Japanujo.



Unua internacia relajso de Esperanto-programo

Ĉiuj esperantistaj radio-amatoroj aŭskultos la 7-an de Oktobro la dissendon de la

# opero "Kiso" de Smetana!

Ĉiuj aŭskultintoj poste skribu al la stacioj Lyon kaj Brno!

Kiel jam plurfoje sciigite, okazos la 7-an de oktobro, vespere je 22.35-23.30 laŭ mez-eŭropa tempo (21.35-22.30 laŭ okcidenteŭropa, kaj 21.55-22.50 laŭ nederlanda tempo) esperantlingva dissendo de la opero «Kiso» de Smetana. Oni ĝustatempe (prefere jam 5-10 minutojn antaŭe) pretigu sian aparaton por kapti la ondojn de Brno (325 m.), Praha (470 m.), Mor.

(nask. 1824) estas la plej eminenta trezentanto de la ĉeĥa nacia muziko, la «ĉeĥa Mozart», kiel oni nomis lin. Li verkis simfoniojn, kvartetojn por strekmuziko, kamermuzikaĵojn, kaj operojn, el kiuj fariĝis plej konata la «Vendita fianĉino». Li estis disĉiplo de Prokŝ kaj Liszt, en 1856 direktoro de la Filharmonia Societo de Göteborg (Svedujo), kaj 1866 orkestr-



F-ino Bakalorá



S-ro orkestrestro Plichta



F-ino Strelcová

Ostrava (269 m.) aŭ Lyon (463). La dissendo okazos el la «verda stacio» Brno, transprenos ĝin la nomitaj ĉeĥaj stacioj Praha, Mor. Ostrava, kaj ankaŭ la franca stacio Lyon PTT. Tio signifas la unuan internacian relajson de Esperanto-programo; tial la afero estas tre interesa kaj grava por ĉiuj esperantistoj. Sed ĝi estas ankoraŭ pli grava por la francaj esperantistoj kiel unua arta

estro ĉe la ĉeĥa Nacia Teatro en Praha. Lia vivofino estis tragika. En 1874 li surdiĝis, kaj li mortis 1884 en la landa frenezulejo en Praha.

La opero «Kiso» havas tri aktojn. Por Esperanto ĝin aranĝis Jiří V. Šamla. Kantos anoj de la Landa Operejo en Brno kaj la ĥoroj de Radiojournal Brno. Ludos la orkestro de la stacio. Estas esperinde ke, antaŭ la aktoj,



S-ro Jedenáctik



S-ro Válka

Esperanto-programo, kiu estas elsendota pere de franca stacio. Laŭ la skribaĵoj (plej utile sendotaj al la Lyon'a stacio, laŭ adreso: Lyon PTT, 47 Cours Gambetta, Lyon, Francujo) oni povos, aŭ ne, daŭrigi la klopodojn por akiri aliajn belajn esperantistajn dissendojn.

Bedrich (= Frederiko) Smetana

okazu mallonga priskribo de la enhavo; ĉar ekster Ĉeĥoslovakio malmultaj jam konas tiun operon.

Niaj kliŝoj, afable disponigitaj de Radiojournal Brno, montras la ĉefajn geaktorojn, kiuj partoprenos en la dissendo de la opero «Kiso», la 7-an de oktobro, kaj la orkestrestron s-ron Plichta.

## Esperanto Radio-Programo

Vendredo, 15 Oktobro:  
20.30-20.50 Bulgaraj stacioj 20, 214, 235 kaj 352 m: Esp.-kroniko.  
Sabato, 16 Oktobro:  
ĉ 16.10 Hilversum VARA 301 m: Esp.-kroniko  
20.05-20.15 Lyon 463 m: Esp.-kroniko.  
Dimaŭdo, 17 Oktobro:  
15.00-15.25 Wallonia 201 m: Esp.-kroniko de A. Tassin.  
22.40-23.10 Hilversum KRO 1875 m.: Parokestro H. Eras: La vivo post la morto.  
Sabato, 23 Oktobro:  
17.10-17.25 Hilversum KRO 1875 m: Esp.-komunikoj de P. Heilker.  
Sabato, 30 Oktobro:  
ĉ 16.10 Hilversum VARA 301 m: Parolado.  
20.05-20.15 Lyon 463 m.: Esp.-kroniko.  
Dimaŭdo, 31 Oktobro:  
15.00-15.25 Wallonia 201 m: Esp.-kroniko de A. Tassin.  
22.40-23.10 Hilversum KRO 1875 m: G. Niward: La grafologio.  
22.00-23.00 PRA 4 San Salvador 740 m: Informoj pri Esp. kaj kantoj.

Aŭskultu kiom eble la esperantlingvajn radiodissendojn! — Dankskribu al la stacioj! La esperantistoj havos la Esperantajn radiodissendojn, kiujn ili meritos!

### Dana radio disaŭdigis parton de Cseh-kurso.

Dana radio, kiu ĝis nun ne tre favoris Esperanton, faris al la esperantistoj agrablan surprizon: la 21-an de septembro, je 21.45-22.00 h., ĝi disaŭdigis la jenan programon: intervjuo kun s-ro Rich. Nielsen, aranĝinto de la kurso; parto el la unua konversacia leciono de la Cseh-kurso en la urbo Nykøbing Falster, gvidita de la konata estona instruisto Nicolai Liventhal, kiu ankaŭ dum venonta vintro disvastigos nian lingvon en Danlando; fine oni aŭdis kelkajn amuzajn demandojn kaj respondojn inter la radioreportisto kaj gekursanoj.

La plej akcentinda flanko de la disaŭdigo estas ke la programo ne estis speciale preparita; sed la radiostacio tute neatendite sendis al la kurso siajn reprezentantojn, kiuj antaŭ treege surprizitaj gelnantoj kaj instruisto eternigis parton de la leciono sur gramofondiskoj.

Kiu aŭskultis la programon, ne forgesu sendi al la radiostacio Kóbenhavn, Danlando, leteron kun danko kaj deziresprimo pri estontaj dissendoj esperantlingvaj.

### Esperanto-Kronikoj el Radio-Nord en Lille (247 m).

Alvenis informo, ke de oktobro la Esperanto-Kronikoj okazos sabate de 14.15 ĝis 14.30 GMT. Ili rekomenciĝos la 9-an de oktobro. (Ĝis nun la Kronikoj okazis ĉiudimanĉe matene, kaj daŭris 20 minutojn.) Verŝajne la stacio decidis ĉi tiujn ŝanĝojn pro ne sufiĉe forta subteno flanke de l'esperantistoj. Se vi deziras, ke nia disaŭdigo ne malaperu, skribu al la stacio, **dankante** ĝin pro ĝiaj Esp.-dissendoj! Ne protestu kontraŭ ĝia decido, sed montru ke la Esp.-Kronikoj estas aŭskultataj. Adreso: Radio PTT Nord, 36 Boulevard de la Liberté, Lille, Francujo.

### Ankaŭ mallongondaj stacioj dissendu Esperante!

Skribu al la mallongonda radiostacio en Podebrady, Praha, Ĉeĥoslovakujo kaj petu, ke ĝi relajsu la Esperanto-dissendojn de Brno. Podebrady estas unu el la plej bonaj mallongondaj stacioj en Eŭropo, kaj, cetere, estas bone aŭdebla en Usono kaj aliaj ekstereŭropaj landoj. Se ĝi konsentos relajsi Brnon, ties Esperanto-disaŭdigoj estos aŭskulteblaj en la tuta mondo.

E. W. A.

# Esperanto en la Moderna Vivo

# 132 el 17 landoj !

La Pariza Konferenco daŭris nur kelkajn tagojn. Estas dirite pri ĝi, ke ĝi multe laboris. Kaj prave! Malofte ĝis nun okazis esperantista kongreso aŭ konferenco, kie estis traktita tiom ampleksa materialo, kiu estus sufiĉinta por plenigi la programon de kelkaj kompletaj sesioj de la Ligo de Nacioj. Admirindaj estis la verve kaj fervoro, kaj samtempe ankaŭ la ordo kaj trankvilo, per kiuj la temoj estis traktitaj. Kaj la atmosfero de serioza laboro, kiu ŝvebis super ĉiuj traktadoj de tiu Konferenco, kaj kiu donis al ĝi sian specialan stampon, faris ĝuste tiun laboran Konferencon neforgesebla por ĉiu partopreninto.

Ni diris ke la Pariza Konferenco daŭris nur kelkajn tagojn. Pro tio ne povis esti ke ĉiu konferencano sin okupu pri ĉio. Ja estis preskaŭ neeble, ricevi eĉ proksimuman imagon pri la tuta farita laboro. En la fina kunsido oni aŭdis kelkajn konkludojn de la diversaj sekcioj, kaj okazis unu fina rezolucio. Sed tio ne sufiĉis por doni iel kompletan bildon. Oni nur sentis kaj sciis, ke estas farita multo. Cetere oni devis kontentiĝi per tio ke post nelonge aperos broŝuro pri la raportoj kaj konkuldoj de la Konferenco.

Tiu broŝuro nun kuŝas antaŭ ni — en formo de bonaspekta amplekseta volumo, sub titolo: « Internacia Konferenco Esperanto en Moderna Vivo, Paris 1937, 14-17 Majo, Raportoj kaj konkludoj ». Kaj nur nun, traŝtante la jam pretan broŝuron, oni povas vere taksu laŭvalore la grandan laboron faritan dum la nunjaraj pentekostaj tagoj en Parizo.

La volumo enhavas antaŭparolon de s-ro André Baudet, la raportojn kaj konkludojn de la kvar sekcioj: Esperanto en Lernejoj, Sciencoj kaj Teknikoj, Internacia Trafiko, Intelektaj Interŝanĝoj, kaj Ĝeneralan Raporton de s-ro Petit kun la fina rezolucio de la Konferenco.

En la antaŭparolo s-ro Baudet diras i.a.: « Nun la sekvoj de la Konferenco kuŝas en la manoj de la esperantistoj, kiuj tralegos tiun libron, kaj ĉefe de la gvidantoj de la landaj Asocioj, kies tasko estos efektiviĝi la deziresprimojn alprenitajn. Ili certe sukcesos se, kiel ni, ili nepre kunlaboros super ĉiu tendenco aŭ asocio kun ĉiuj interesataj fakuloj. »

La legado de la broŝuro donas al la esperantisto grandan plezuron. Fakte, konstatoj, ŝanĝoj, opinioj, iniciatoj,

Ĝis la mezo de septembro jam aliĝis al la 30-a Universala Kongreso de Esperanto en Londono 132 gesamideanoj el 17 landoj. Multaj simptomoj antaŭvidigas ke « Nia Trideka », en la ĉefurbo de la Brita Imperio, la plej granda urbego de la « malnovaj » kontinentoj, fariĝos laŭ nombro de la partoprenantoj unu el la plej imponaj kongresoj esperantistaj.

Ankaŭ vi ne longe hezitu, sed tuj kompletigu la Aliĝilon kaj sendu ĝin al la adreso de la kongresa sekretariejo !

## 30a Universala Kongreso de Esperanto Londono, 30 Julio ĝis 6 Aŭgusto 1938

### Dua Listo de Kongresanoj.

16. H. Gielb, Warszawa, Polujo.
17. D-ro P. Kempeneers, Bruxelles, Belgujo.
82. C.W. Gardner, Sheffield, Anglujo.
83. S-ino M.I. Gardner, Sheffield, Anglujo.
84. P.J. Cameron, Letchworth, Anglujo.
85. F-ino E.M. Bartholomew, Letchworth, A.
86. F-ino N. Ford, Bournemouth, Anglujo.
87. F-ino M.H. Rook, London, Anglujo.
88. E.K. Jayne, Croydon, Anglujo.
89. D. P. Boatman, Southend-on-Sea, Angl.
90. S-ino D.P. Boatman- Southend-on-Sea, A.
91. F-ino F.W. Mc Auslan, London, Anglujo.
92. A.T.J. Gueritte, Surbiton, Anglujo.
93. S-ino M.L. Gueritte, Surbiton, Anglujo.
94. F-ino A. Fotherby, Surbiton, Anglujo.
95. S-ino H. Gueritte, Versailles, Francujo.
96. F-ino L. Gueritte, Versailles, Francujo.
97. P.J. Gerard, London, Anglujo.
98. F-ino I.C. Fortey, Croydon, Anglujo.
99. W. Harvey, Edinburgh, Skotlando.
100. E.L. Johnson, London, Anglujo.
101. B.F. Beaumont, Oxford, Anglujo.
102. P. Le Brun, Kreuzlingen, Svisujo.
103. C.M. Houghton, Welwyn Garden City, A.
104. S-ino L. Goughton, Welwyn G. City, A.
105. S-ino E. Page, Edinburgh, Skotlando.
106. W.M. Page, Edinburgh, Skotlando.
107. C.A. Baker, Bath, Anglujo.
108. H. Reed, Letchworth, Anglujo.
109. F-ino S. Reed, Letchworth, Anglujo.
110. S-ino V. Reed, Letchworth, Anglujo.
111. L.J. Kieran, Nice, Francujo.
112. F-ino A.B. Holness, New Barnet, Angl.
113. S-ino M.A. Hirst, Huddersfield, Anglujo.
114. W. H. Hirst, Huddersfield, Anglujo.

115. F-ino C. S. Mead, London, Anglujo.
116. H. Popper, Böhmisch-Kamnitz, Ĉeĥosl.
117. Prof. G. Rotondo, Bari, Italujo.
118. J. Guillaume, Paris, Francujo.
119. Rezervita.
120. S. Szyk, Wilno, Polujo.
121. S-ino H. Szyk, Wilno, Polujo.
122. F-ino M. Jones, Seven Sisters, Kimrujo
123. Rezervita.
124. Rezervita.
125. W.H. Errington, London, Anglujo.
126. S-ino A.C. Hooper, London, Anglujo.
127. J. T. Hooper, London, Anglujo.
128. F-ino Hooper, London, Anglujo.
129. G.W. Goodall, London, Anglujo.
130. S-ino Goodall, London, Anglujo.
131. F-ino A.B. Edwards, Bishop Auckland, A.
132. W. Davies, Swansea, Kimrujo.
133. F-ino E. Walters, Lindoln, Anglujo.
134. F-ino P.A. Freeman, Mark Cross, Anglujo
135. A. Jensson, Stabekk, Norvegujo.
136. F-ino L. Sanberg, Bekkelaget, Norvegujo
137. T.J. Footman, Birmingham, Anglujo.
138. S-ino M. Footman, Birmingham, Anglujo.
139. D. Kennedy, Glasgow, Skotlando.
140. E.W. Willcocks, London, Anglujo.
141. J. Vilkki, Somero, Finnlando.
142. S-ino S. Vilkki, Somero, Finnlando.
143. F-ino E. O'Brien, London, Anglujo.
144. F-ino S.G. O'Brien, Worthing, Anglujo.
145. F-ino J. Baird, Edinburgh, Skotlando.
146. D-ino J.W. Downie, Glasgow, Skotlando.
147. F-ino B.M. Savage, Toronto, Kanado.
148. S. Peksa, Nowy Targ, Polujo.
149. F-ino B. Ashby, Birmingham, Anglujo.
150. E.G. Ducker, Liverpool, Anglujo.
151. T.G. Briggs, Nottingham, Anglujo.
152. S-ino M. Briggs, Nottingham, Anglujo.
153. S-ino H. Warren, London, Anglujo.
154. T. Pattinson, Gateshead-on-Tyne, Angl.
155. F-ino C. Leadley-Brown, Wallasey, Angl.
156. F-ino S. McCullough, Belfast, Irlando.
157. C.F. Hayes, London, Anglujo.
158. A. Leftwich, Alford, Anglujo.
159. F-ino B.M. Chipperfield, London, Angl.
160. J. Tempest, Bradford, Anglujo.
161. S-ino A.E. Stacy, Buckhurst Hill, Anglujo.
162. F-ino A.M. Stacy, Buckhurst Hill, Angl.
163. F-ino E.G. Stacy, Buckhurst Hill, Anglujo
164. F-ino N.A. Stach, Buckhurst Hill, Angl.
165. H. Huber, Merkersdorf, Aŭstrujo.

### Laŭlanda statistiko de la aliĝintoj.

Anglujo, 84; Aŭstrujo, 2; Belgujo, 1; Ĉeĥoslovakujo, 1; Finnlando, 2; Francujo, 14; Germanujo, 3; Irlando, 1; Italujo, 1; Kanado, 1; Kimrujo, 2; Nederlando, 5; Norvegujo, 2; Polujo, 4; Skotlando, 7; Svedujo, 1; Svislando, 1; entute 132 el 17 landoj.

konsilioj, deziroj; ankaŭ malvenkoj kaj bedaŭroj. Ni ŝatus represi ĉion interesan por alirigi ĝin al kiel eble plej granda rondo da samideanoj tutmonde. Sed tiukaze ni devus kopii preskaŭ la tutan libron. Certe estos en estonteco ofte la okazo atentigi pri iuj partoj en tiu ĉi libro aŭ citi tiajn partojn.

luloke okazis iom ĝenaj preseraroj, ekzemple sur paĝo 9: « En Bydgoszcz la lanternoj de ŝtata klasika gimnazio ricevis cenzurojn sur siaj lernejoj ates-

toj ». (Anstataŭ « lanternoj » legu « lernantoj »!)

Generale la « Raportoj kaj konkludoj » de la Konferenco prezentas belan, modernaspektan volumon, kaj gravan dokumenton, kiu devus esti en la mano de ĉiu propagandisto.

Samideanoj, eluzu la riĉan materialon, kiun la Konferenco « Esperanto en la Moderna Vivo » havigis — kiel ĉiam valoran trezoron por vi, por via laŭcela ideala laboro ! T. J.

## 30-a Kongreso de EANA

*Komence de julio okazis en Washington la 30-a Kongreso de EANA. Pri tiu ĉi kongreso ni ricevis la jenan raporton:*

La lastan monaton, Kongreso de Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko festis en la ĉefurbo la oran jubileon de Esperanto. 8000 ekzempleroj de la semajna rajtigilo por aŭtobusoj kaj tramoj en Washington surhavis desegnon pri la ora jubileo kaj pri la Kongreso de Esperanto. Preskaŭ 200 membroj ĉeestis kaj la kongreso bone sukcesis. La bone konata s-ano Joseph R. Scherer prezidis. D-ro F. A. Cottrell kaj D-ro Ward Nichols, famaj Vaŝingtonaj sciencistoj, estis inter la kongresanoj. Malfermis la kongreson s-ro Karl Stefan, ano de Edukada Komitato de la Usona Parlamento.

La usona gazetaro presis multajn kolonojn pri Esperanto. Kelkaj ĵurnaloj ŝercis pri aspektoj de nia afero; sed eble tiuj komediaj komentoj faris pli bonan propagandon ol la simpatiaj kaj seriozaj. Inter la gazetaraj komentoj oni demandis, ĉu maŝino estas nun elpensebla kaj konstruebla, kiu rekte presos la literan Esperanton el la voĉa Esperanto, ĉar Esperanto ja estas tiel fonetika, kiel ĉiu sono havas sian specialan voĉbildon (osciligramon). Tia maŝino povus forigi la uzon de la stenografio kaj la kritiklegadon (legadon de presprovaĵoj). Fizikistoj en Washington opiniis ke tia nova maŝino estus la malo de la optofono, pro kiu laboris sensukcese Alexander Graham Bell. La optofono intencas sonigi karakterizan akordon al blindulo ĝuste kiam aperas presita litero antaŭ la mekanika okulo de la optofono. Ĉu estas iu esperantisto, kiu scias pli multe pri tiuj eble gravaj maŝinoj?

Hugh Shatford

\*

Ni ricevis ankaŭ ekzempleron de la bonega « Kongresa Libro », kiu enhavas valorajn artikolojn kaj kelkajn interesajn ilustraĵojn. Atentinde estas ke la kongresoj de EANA atingis jam pli grandan nombron ol la internaciaj: ili okazis regule ekde la jaro 1908, kaj ankaŭ dum la tuta mondmilito.


La venonta (31-a) kongreso de EANA havos lokon en Cleveland, Ohio.

### La kontraŭuloj asertas

**ke Esperanto ne estas, kiel la naciaj lingvoj, ligita kun ia difinita nacieco. Vere! Sed ĝuste tio estas avantaĝo por la helplingvo, ĉar tiel ĝi efektive estas neŭtrala.**

## Jubilea Esperanto-Kongreso en Ŝanhajo

**500 partoprenintoj. --- Oni decidis fondi Ĉinan Esperanto-Ligon kaj membri ĝin al Internacia Esperanto-Ligo.**



*El Ŝanhajo ni ricevis la jenan raporton:*

Kun granda ĝojo ni informas al vi la staton pri la 50-jara jubilea kongreso de Esperanto okazinta la 14-an de julio en Ŝanhajo, kunvokita de nia Ŝanhaja Esperantista Ligo.

La kongreso mem okazis por celebrado. Ĝi havis lokon en Ninpoana Societo, Yu-Yacheng Stsato, kaj komenciĝis je la dua horo posttagmeze. Ĝin partoprenis ĉirkaŭ 500 personoj, plejparte esperantistoj. Inter ili estis 14 delegitoj el diversaj lokoj kaj 13 ĵurnalistoj. Prezidis Joĉaŝien kaj protokolis Kianĉinhao.

La programo: 1. Malferma parolo de la prezidanto; 2. Espero (komune); 3. Deklamo de salutleteroj (entute 43 leteroj kaj telegramoj el diversaj lokoj ricevitaj, kelkaj ĉefaj deklamitaj); 4. Raporto (raportis 11 delegitoj); 5. Parolado (parolis 3 fremdaj kaj 5 ĉinaj esperantistoj); 6. Fotografado; 7. Amuzoj (4 etaj teatraĵoj esperantaj 1 ĉina teatraĵo, 1 esperanta kanto, 3 ĉinaj kantoj kaj buŝharmoniko).

Finiĝis la propra kongreso je la sesa horo.

Vespere de la sepa horo ĝis la naŭa okazis kunsido inter diverslokaj delegitoj en restoracio. Ĝi estis la spirito de la kongreso. Ĉiuj scias bone ke en Ĉinio ne fondiĝis ĝis nun la nacia grupo esperanta. Speciale por diskuti la problemon de venonta nacia grupo, estis kunvokita la kunsido kaj tial do la kongreso.

Dume naŭ rezolucioj estis deciditaj pri la nacia grupo:

1. La nacia grupo estos nomata Ĉina Esperanto-Ligo.
2. Ĝi aliĝos al Internacia Esperanto-Ligo kiel nacia filio.
3. Ĝi estos neŭtrala kaj laŭleĝe fondita.
4. Ĝiaj plej gravaj taskoj estas laŭsisteme interrilatigi lokajn grupojn, al lokaj opaj esperantistoj helpi fondi novajn grupojn kaj fratece interrilati kun ĉiulandaj naciaj grupoj.
5. Ĝiaj membroj estos duspecaj: grupaj kaj individuaj. Devoj kaj rajtoj de la grupaj membroj kaj tiuj de la individuaj devas esti malsamaj.
6. Provizore la laborantoj de la nacia grupo ne estos pagataj.
7. Ĝia konstanta elspezo dependos de membrotito, kaj la elspezo por fondiĝo proporcie pagos la aliĝintaj lokaj grupoj. Se necese, monkolektado.
8. Ĝi eldonos organon, kaj bonrimede subgvidigos aŭ al proprigos ekzistantajn naciecajn instituciojn esperantajn.
9. El la kunsido fondiĝos unue la preparkomitato de nacia grupo esperanta. Ĝi petu al malnovaj esperantistoj esti iniciatantoj. Post malpli ol duonjara preparado, tiam oni fondos oficiale la nacian grupon.

Alipoŝte ni sendas al vi foton de la jubilea kongreso. Sincere ni petas vian efikan helpon kaj gvidon. Kun saluto.

Sincere via,  
Ŝanhaja Esperantista Ligo  
Sekretario: (Subskr.) Joĉaŝien.

\*



# Jubilea Esperanto-Kongreso en Zagreb

**600 partoprenintoj. — Aliĝo al IEL. Salutparolado de la protektanto de la Kongreso, urbestro D-ro T. Peičič. — Internacia Esperanto-Kongreso en la jaro 1939 en Zagreb?**

La nacia kongreso de la Esperanto-movado en Jugoslavio okazis la 5-an kaj 6-an de septembro en Zagreb. Ĝi estis duoble jubilea, ĉar ĝi estas la dek nacia Esperanto-kongreso en Jugoslavio, kaj krom tio per ĝi ni festis la 50-an jubilean datrevenon de Esperanto. La programo estis jena:

La 5-an de septembro je la 8 h. diservo kun esperantlingva prediko (pastroj s-roj Domac kaj Esih). Je la sama tempo estis kunveno de IEL-anoj. Kiel ĉefdelegito por Jugoslavio estas proponita D-ro I. Lapenna. Krom tio aliĝis al IEL multaj novaj anoj.

Je la 10 h. estis solena malfermo de la kongreso. Prezidis D-ro Maruzzi, kaj la kongreson malfermis la urbestro de Zagreb, D-ro T. Peičič per salutparolado, kiun 600 partoprenintoj en la plenplena salono de la kroata parlamentejo aŭskultis kun granda intereso kaj fine aprobis per forta aplaŭdo. Ĝi tekstis:

« Estimataj gesinjoroj! Mi konsideras kiel specialan honoron, ke vi min invitis esti protektanto de tiu ĉi kongreso. Mi tion faris tiom pli volonte ankaŭ el persona inklino al memoroj, kiuj ligas min kun Esperanto. Mia patro estis fervorega esperantisto. Li kontaktiĝis kiel studento kun la fondinto de Esperanto, Zamenhof, kaj tiom entuziasmiĝis por liaj teorioj, ke li poste, kiam li revenis al ni, estis unu el la plej fervoraj propagandantoj de Esperanto. Mi akompanis en mia juneco tiun ĉi agadon kaj mem kunlaboris en ĝi. Tial estas por mi speciala honoro, ke mi estas hodiaŭ ĉi tie. Mi ne devas tie ĉi paroli pri la graveco de via kongreso, ĉar vi ĉiuj tion mem bone komprenas kiel konvinkitaj esperantistoj. Sed mi volas mencii al vi unu ekzemplon. Hieraŭ, sur ĉi tiu sama loko, preskaŭ en la sama tempo, parolis ĉe kunveno de Asocio de Ŝparkasoj unu italo. Li parolis unue en la franca, poste en la germana lingvoj, kaj tiam li senkulpigis sin, ke li ne povas paroli tiel, ke ĉiuj kune komprenu lin, kaj li diris ke nur per Esperanto oni povas atingi tion, ke li esprimu siajn pensojn, kaj ke ĉiuj samtempe komprenu lin. Tio ĉi estas plej bona pruvo, ke Esperanto estas grava kaj bezonata. La nomo « idealistoj », kiun oni ofte aldonas al esperantistoj, ne estas moka, sed kontraŭe honora. Vi estas pioniroj, kiuj serĉis kaj kiuj trovis, kiel vi interkompreniĝos kun ĉiuj, kaj ĝuste per tiu ĉi via penado vi deziras disvastigadi la amon, kiu estas fundamento de homoco. Vivu kaj kresku la Esperanta movado, por ke ĝi alproksimigu nin al tiu granda idealo kaj por ke la idealoj kiom eble plej baldaŭ realiĝu. Vivu! »

Je la sama tempo, kiam la supre represita raporto atingis nin, ĝuste en kaj ĉirkaŭ Ŝanhajo okazas akraj bataloj, kies fino kaj rezultoj ankoraŭ ne estas antaŭvideblaj. Povas esti, ke pro la nova milito la sukceso de la kongreso de l' ĉinaj samideanoj, kaj la rezultoj el la decido pri la fondo de Ĉina Esperanto-Ligo, provizore ne estos tre grandaj, kaj ke do ankaŭ la decido pri aligo de tiu ligo al IEL provizore havas nur moralan signifon. Tamen la fakto, ke ankaŭ en la Lando de l' Mezo estis

Poste sekvis salutparoladoj de la reprezentantoj de diversaj institucioj, traĝegado de salutleteroj, telegramoj, paroladoj de la delegitoj el ĉiuj urboj. Je la nomo de IEL salutis la kongreson inter la unuaj s-ano Musi Anton, kiu traĝegis la leteron de IEL. Preskaŭ ĉe ĉiuj parolantoj oni sentis grandan sopiron por unueco por kontraŭbatali niajn komunajn malamikojn, kiuj en kelkaj landoj malpermesis Esperanton kaj eĉ persekutas esperantistojn. Plej fortan aplaŭdon ricevis la reprezentanto de Akademia Esperantista Klubo, kiu en sia belega parolado forte akcentis tiun bezonon por unueco, ĉar kiel li finis: « Unueco estas forto! ». Je la nomo de la laboristaj esperantistoj, kiuj multnombre ĉeestis, salutis la kongresanaron s-ano Kolarič Mato. Post la kongreso estis komuna fotografado kaj tagmanĝo.

La saman tagon posttagmeze estis ĉefkunveno de Jugoslavia Esperantista Ligo. Estas elektita nova liga komitato, kiu konsistas plejparte el anoj de Akademia Esperantista Klubo, kun la juna kaj vigla prezidanto D-ro Lapenna Ivo, kiu ĝuas simpatiojn de ĉiuj esperantistoj. Krom tio en la komitato eniris s-anoj Kozlev-ĉar Joze el Ljubljana, D-ro Maruzzi Dušan, el Zagreb, D-ro Stefanĉič el Beograd kaj D-ro Kun Leo, redaktoro de « La suda stelo » el Brod.

Krom aliaj decidoj la ĉefkunveno decidis laŭ propono de Akademia Esperantista Klubo aliĝi al IEL, plivigligi la propagandon de Esperanto (verda semajno fine de septembro ktp), proponi al IEL ke la Internacia Esperanto-Kongreso por la jaro 1939 okazu en Zagreb ktp.

En la sama tempo okazis konferenco de ĉiuj laboristaj societoj en nia lando, kiu ankaŭ bone sukcesis, kaj alportis bonajn kaj fruktodonajn rezultojn.

Vespere okazis amuzvespero kun Esperanta programo, kiun preparis Laborista Esperantista Societo en Zagreb. La sekvintan tagon estis ekskurso al Samobor apud Zagreb, kiu tre bone sukcesis. La ekskursintojn multe kaj sprite amuzis geedzoj s-roj Yelland el Anglujo. Laŭ vigleco, intimo kaj bonhumoro, kiu regis ĉe ĉiuj aranĝoj, ĝi estas la plej sukcesa el ĉiuj ĝisnunaj kongresoj.

Ekstere la kongreso estis ne tro pompa kaj ne tro brila, sed tamen ĝi signifas grandan propagandon por Esperanto, ĉar multaj gazetoj multe kaj simpatie skribis pri Esperanto kaj bele raportis pri ĉiuj kongresaj aranĝoj. La unuan fojon kelkaj Zagrebaj tagjurnaloj alportis Esperantan tekston, per kiu ili bonvenigis la kongresanojn. Kontentaj disiris ĉiuj kongresanoj al siaj urboj kaj vilaĝoj kun belaj impresoj kaj decidoj, ankoraŭ pli multe labori kaj propagandi nian karan lingvon. Komune ĉiuj kontraŭ ĉiuj malamiko! Ĉar unueco estas forto kaj forto — venko!!!

A. Turkoviĉ

eble, kunvenigi duonmilon da samideanoj por impona jubilea kunveno, pravas al ni unu plian fojon ke, malgraŭ ĉio, nia afero vivas kaj progresas universale.

Ni gratulas niajn Ŝanhajajn amikojn pro ilia fervora laboro kaj esperas, ke la nuna milito baldaŭ estos finita, kaj ke tiam Ĉina Esperanto-Ligo, en la kadro de IEL, per energia paca laboro atingos por nia afero ankoraŭ multajn gravajn sukcesojn en la Malproksima Oriento.

# 11-a Hungara Kongreso

Denove estis belaj tagoj en Hungarujo kun granda morala sukceso. La Ujpesta grupo de HES sub gvido de Hungara Esperanto-Federacio aranĝis brilan kongreson. La 21.8. vespere la grupejo estis plenplena, kiam la senlaca grupprezidanto L. Zinner malfermis la vesperon. Ne estas loko por reciti la tutan programon. Sufiĉu: konataj membroj de ERA kantis, deklamis, parolis kaj prezentis la burleskaĵon « Sinjoro Herkuleso » kun vere bona aktora arto. Salutis s-ro Mulholland el Newcastle kaj la negra samideano Kola Ajayi. Jozefo Major reveninta el Ŝanhajo atingis grandan sukceson per sia rakonteto.

Dimanĉe matene la granda katolika preĝejo de la urbo estis rezervita por Esperanta meso. La ĥorkantado kaj prediko okazis en Esperanto. Papa ĉambelano Prof. D-ro Fr. Erdey parolis al la publiko en hungara lingvo pri Esperanto kaj en Esperanto pri la religiaj ecoj de Esperanto.

Poste pleniĝis la urbdoma ĉambrego, kie nome de la kongresa komitato dir.-insp. Z. de Rákosi malfermis la kongreson. Prez. Prof. J. de Mihalik atingis grandan aplaŭdon per sia raporto pri la Jubilea Kongreso kaj per salutparolado. Li bone pruvis ke ne necesas tiel labori por la patrujoj, ke oni malamas unu la alian; neniu oni malbontraktu pro religio aŭ nacieco. Senfina ovacio estis por la urbestro, ĉefprotektanto D-ro Aladár de Semsey, kiu tiom helpis la kongreson (eĉ sur la urbdomo flirtis la verda flago). Verve deklamis poemon festan Elinjo Bodnár. Salutis la kongreson reprezentantoj de la grupoj de Debrecen, Békés, ERA, Pécs, Mátészalka, Skoltoj, Hódmezővásárhely, Ujpest, pedagogia, katolika, kristana, nacia, landa, blindula ktp. societoj. Plej kore estis akceptata parolado de f-ino Ella Baldwin-Smith el Barry (Kimrujo), kiu rakontis ke per Esperanto ŝi tiom ekonis Hungarujon, ke hejme ŝi skribis artikolojn pri ĝi.

La kunsido kun aplaŭdo akceptis la raporton de P. Balkányi, kiu salutis en la nomo de IEL, kaj laŭ propono de Prof. Mihalik oni akrame akceptis lin kiel ĉefdelegiton de IEL en la kadro de Hungara Esperanto-Federacio.

La solena parto estis la parolado de Julio Baghy, kiu rakontis pri la jubilea kongreso kaj deklaris, ke la sola fundamento de la neŭtrala esperantistaro estas la interna ideo. Baghy deziras, ke la esperantistaro progresu, laboru dum la sekvanta jaro sen halto kaj atingu, ke Esperanto fariĝu minimume eŭropa lingvo, ĉar sen tio la malgrandaj nacioj kun siaj lingvoj pereos.

Sekvis rezolucioj pri instruado, statistiko, landa kongreso kaj mezeŭropa kulturkongreso en 1938 en Pécs, alvoko por subteni la landan Esperanto-muzeon aranĝitan de D-ro J. Takács en Nagymaros, al kiu la kongreso esprimis dankon; alvokoj al la fervoraj direktoj; al la laboristaro, kiu en kadro de HEF deziras uzi Esperanton; promeso kunhelpi sen religia diferenco la gastejo de la Eŭkaristia Mondkongreso en 1938; komisiono pri Esperantodomo, pri « Hungara Heroldo », pri fortigo de IEL; danko al la skolta asocio ktp.

Post la kunsido oni marŝis sub gvido de la urbestro kaj skoltoj al la monumento de herooj kie Prof. Mihalik metis florkronon, kaj al la « Landflago » en la urba ĝardeno, kie insp. Rákosi diris festan paroladon. La skoltoj, pli ol 20, aranĝis apartan kunveneton kaj salut-alvokis ĉiujn skoltojn lerni Esperanton.

Post komuna tagmanĝo kaj laborkunsido sekvis ekskurso al praaj urbo Aquincum.

Oni devas mencii, ke, kvankam ĉeestis pli ol 140 personoj, nur iom pli ol 50 estis pagantaj membroj, kaj tial la ofereman laboron de la aranĝintoj devis en lasta momento helpi la mondonacoj de multaj bonkoraj, entuziasmaj kongresanoj. La ĉefa celo estis atingita: montri vivon, forton, animon de la movado, atentigi pri ĝi parton de la publiko kaj fortigi la kredon en multaj adeptoj.

(Iom mallongigita raporto de P.B.)


# Tomas Masaryk mortis

La esperantistaro kondolas post la morto de la granda prezidanto.

La esperantista legantaro bone konas la « Malriĉan knabon kiu gloriĝis », — tiun libron, kiu rakontas pri la mirinda kaj nobla vivo de la granda ĉeĥoslovako Tomas Masaryk. Tiu homo ne plu vivas. Li foriris, lasinte en profunda funebro ne nur siajn landon kaj popolon kies edukinto kaj justa gvidanto li estis, sed ankaŭ la demokration de la tuta mondo.

La vivo de Masaryk estis nobla batalo

de popolo, kiu tiom forte komprenis nin esperantistojn kaj nian movadon. La simpatio de Ĉeĥoslovakio al nia movado ne estas sole konvencia; tiu simpatio evidentiĝas en fortega, oficiale subtenata Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio, en multaj oficialaj eldonaĵoj esperantlingvaj kaj en propagando de nia movado per la glora jam « Verda Stacio » en Brno, kiu sendas en la mondon



LA PREZIDANTO-LIBERIGINTO T. G. MASARYK.

por la vero kaj justeco, sen kiuj — li instruis — ne povas progresi la homaro. La progreso de la homaro devas baziĝi je bonstato kaj feliĉo de l' popoloj, kion atingi oni povas per demokratio, kiam ĉiu homo en libereca atmosfero povas disvolvi siajn ideojn, planojn kaj laborojn. Pri sia profunda trakto de la problemo, Masaryk fariĝis modelo ne nur por sia lando, sed ankaŭ por la demokratio de la tuta mondo.

Ni esperantistoj, kiuj en sia plimulto estas demokrata popolo, kunsentas la doloron de la ĉeĥoslovakoj kaj la tutmonda demokratio, kaj ni partoprenas en ilia profunda funebro. Krom tiu kaŭzo ni havas ankaŭ alian kaŭzon por funebri; Tomas Masaryk estis gvidanto

vokon por komprenigi la popolojn unu al la alia.

En la manon de la Verda Stacio en Brno ni esperantistoj metu nian profundan senton de funebro pro la morto de la granda Tomas Masaryk.

Samtempe mi proponas jenon: por esprimi nian kunsenton, ĉiu esperantisto sendu kondolenco-karton al: Radio-journal *Brno*, Ĉeĥoslovakujo. Samideanoj skribu multnombre, por ke vidu niaj ĉeĥoslovakaj propagandantoj, ke ni memoras pri ili ne nur tiam, kiam ili nin regalias per ĉarma Esperanta muzikaĵo, sed ni ankaŭ amike partoprenas en ilia profunda funebro.

(Represo estas dezirata.)

Henriko Gielb.

## La nacia "Eisteddfod" de Kimrujo

Rezulto de la Esperanto-Konkurso.

Frue en la nuna jaro aperis en la Esperanto-gazetaro informo pri interesa konkurso por esperantistoj aranĝita okaze de la Nacia Konkursfesto (« Eisteddfod » de Kimrujo. Oni devis verki traktaton en Esperanto pri la temo: « Esperanto kiel komprenigilo inter la nacioj. » La premio por la plej bona traktato estas £ 5, kiun gajnis s-ro P. Friedland, Estonujo, sub pseŭdonimo « Haife ».

La juĝinto de la traktatoj estas Kanoniko W. H. Harris, kiu antaŭ kelkaj tagoj ĉe la festo devis prezenti kimre kaj Esperante sian prijuĝon. La « Western Mail », tre grava kimra tagjurnalo, raportis pri la Esperanto-konkurso kaj aldonis: « Kanoniko Harris estas gratulinda ne nur pro sia flua esperantlingva prijuĝo, sed ankaŭ pro la evidentaj zorgoj kaj laboro kiujn li estis dediĉinta al la tasko. » Kanoniko Harris plue sukcesis aperigi tre bonan artikolon pri la Varsovia Kongreso en la « Western Mail ».

E.W.A

## Ni funebras

— S-ro ADEODATO BARRETO, delegito de IEL en Aljustrel, Portugalujo, entuziasma propagandisto de lingvo internacia, mortis la 6.8. 1937. Li estis naskita la 3.12.1904 en Salsete, Portugala Hindujo. Adeodato Barreto estis advokato kaj notario; li suferis grandajn malagrablaĵojn de la aŭtoritatoj pro sia Esperantismo, kaj eble tiu maljusteco favoris lian malaperon. Sentemajn kondolencojn al lia funebra familio!

— S-ro univ. prof. D-ro LADISLAV ROHRER el Pécs, Hungarujo, membro de IEL, konata scienculo, kiu precipe per sia sanigmetodo ĉe kancermalsanuloj atingis grandan famon, mortis post operacio en Budapeŝto. Li prelegis en Esperanto dum la Somera Universitato okaze de la Universala Kongreso 1929 en Budapeŝto. Li estis rektor-kandidato por la sekvonta jaro en Pécs, kies Esperanto-grupo perdis tre valoran membron kaj protektanton. Koran kondolencon!

— F-ino AGATHA MARIA WIERSMA, la fervora sekretariino de « Frisa Esperantista Rondo » en Leeuwarden, Nederlando, mortis nur 46-jara, post suferiga malsano, la 4.9.1937. Koran kunsenton al frislandaj gesamideanoj!

— S-ro vicurbestro WILHELM KORNFELD en Jaslo, Polujo, patro de nia konata samideano S. Grenkamp-Kornfeld, Paris, estas portita al la lasta ripozejo. Li estas multjara konsilinto, prez. de la izraelida komunumo, prez. de multaj bonfaraj societoj kaj ĝenerale amata. Preskaŭ la tuta urbo sekvus lian ĉerkon. Al s-ano Grenkamp ni esprimas nian koran kunsenton.



# La Esperanto-Literaturo kreskas

**G. K. Chesterton: La Naiveco de Pastro Brown.** Esperantigis D-ro Cecil Bean. Populara Esperanto-Biblioteko n-ro 14. Eldonita de The Esperanto Publishing Co. Ltd. Heronsgate, Rickmansworth, Herts, Angl. Havebla ĉe ĉiu esperantista librovendisto. — Bindita. — Prezo 3 ŝ. 6 p. Afranko: 4 p. — Formato 12x19 cm, 256 paĝoj. (Havebla por 1.95 guldenoj, inkluzive de sendkostoj, ĉe Heroldo de Esperanto, Scheveningen, Nederlando.)

Sen dubo, tre granda parto el ĉiuj legantoj de publikaj bibliotekoj estas ŝatantoj, kelkfoje eĉ admirantoj de detektivaj verkaĵoj. Kvankam ekzistas sufiĉe da homoj havantaj por tiaspeca literaturo nur kompatan rideton, ĝi por multaj aliaj prezentas la supron de lega ĝojo, amuzo kaj distro. Do, ankaŭ ni esperantistoj ĝoju, ke la Esperanta literaturo ree pliriĉiĝis per tia libro. (Cetere, ja ne abundas detektivaj libroj en Esperanto.) Sen troigo estas direble, ke t i a n detektivan verkon en Esperanto oni ĝis nun ne havis.

« La Naiveco de Pastro Brown » ne estas unu sola historio longa kaj eble tial iom teda aŭ laciga. Ne, la libro enhavas dekduon da detektivaj noveloj, el kiuj la sekvanta ĉiam estas pli interesa, pli streĉa kaj pli surpriza ol la antaŭinta — kaj tio ja signifas ion, ĉar jam la unua estas streĉita kiel tuj ekpafanta arko. Vere brila estas la talento de Chesterton, en konciza rakonto mallonge sed surprize konvinke starigi antaŭ ni la krimon kaj ĝian solvon. Preskaŭ ĉiufoje ne temas pri bagatelaĵoj, sed pri sukaj, « dikaj » krimegoj.

La ĉefpersono estas la simpla (rom-katolika) pastro Brown, kies intima amiko fariĝis antaŭa ĉefkrimulo, la franco Flambeau, poste privata detektivo. Tiu pastro Brown havas intuician, kvazaŭ miraklan ekkonon pri ĉia krimo. En plej mallonga tempo li kapablas indiki kulpulon kaj manieron de la krima faro, ĉu per sia naiva geniececo, ĉu per sia genia naiveco.

Por tiuj, kiuj legas iom kritikeme tiajn librojn, estos aparte plezurige eltrovi la malfortan punkton de epizodo, t.e. tiun cirkonstanceton, kiu, neĉestante, malebligis la tutan malkovron. Bedaŭrinde, en la kruda reala vivo tiu cirkonstanceto kutime malestas.

Nun iom pri la lingvo de la traduko, kiu ŝajne estas farita zorge kaj fidele, kelkloke eĉ tro fidele, ĉar frazeroj kiaj: lasi sidigi cilindro sur vin mem (86), se vi dubas la penton esti vere fakto (74), per konduko de ĉies pensojn for de ĝi (76), vi kredas ke vi provas pruvu kion? (43), vi pridiris al iu (102), mi ne kondutos min ŝpare (211), estis io terura pri kiel la figuroj (172), alta voĉo kiel kokkrio, kiun li intencis esti amikeca kaj gaja (149) ktp., estas angla lingvo esprimita per Esperanto. Sed la unua celo, la premo de traduko ja estu senriproĉa lingvo, do en nia kazo **Esperanta Esperanto.** En kiu konsistas tiu lingva pureco, tion sen ia dubo ĉiam klare respondas la demando: Ĉu Zamenhof estus skribinta tiel?

Jofebo.

**Third America Japan Student Conference 1936.** Aperis luksa, ilustrita dokumenta eldonaĵo anglalingva pri la tria konferenco de amerikaj kaj japanaj studentoj en Tokio. Ni legas en ĝi sur 6 diversaj paĝoj pri internacia lingvo aŭ Esperanto. La temo de internacia lingvo estis en la laborplano de la Kultura Komisiono de tiu konferenco, kaj oni diskutis ĝin tie. S-ro Kawamoto parolis pri la ĝenerala aspekto de la problemo de lingvo internacia, s-ro Kimura pri la stato de la japana Esp.-movado. — La demando pri int. lingvo kaŭzis grandan interreson, s-ro Kimura faris alparolon en Esp., kiun s-ro Kubo tradukis anglan. Ĉiuj delegitoj (ni legas en la raporto) estis konvinkitaj ke Esperanto estas necesa internacia lingvo.

**Julio Baghy: La Verda Koro.** Facila romaneto por komencantoj. Budapest 1937, 100 paĝoj. — Havebla por guld. 1.10, inkl. sendkostoj, ĉe Heroldo de Esperanto, Scheveningen, Nederlando.

Facila romaneto, kiu samtempe katenus la atenton de la lernantoj, estis necesa. Kaj Baghy estas aŭtoro, kiu scipovas kateni siajn legantojn. Ankaŭ en ĉi tiu libro, kiu — oni preskaŭ dirus: kompreneble kaj tradicie — rakontas pri Siberio, Baghy montras sin verva aŭtoro. La rakonto, ne tro komplikita, fluas kaj tenas tiamaniere ke multaj legintoj estos dezirantaj legi ankaŭ la aliajn verkojn de Baghy.

La « Verda Koro » enhavas krome kelkajn poemojn, sed ĉi tiuj ŝajnas al mi ne samnivelaj kun la alia poezia verkaro de Baghy. Por la instruisto tamen la poemoj estos bonvenaj; ĉar kvankam multaj poemoj aperas en Esperanto, tamen estas ĉiam malfacile trovi taŭgajn por la kurso. Kaj por tiu celo la poemoj de « Verda Koro » certe taŭgas.

Kalocsay verkis sintakson en la libro, kiu estas destinita — almenaŭ tiel ŝajnis al mi — por la instruisto. Mi ne supozas, ke komencanto ĝuos tian legaĵon. Ĉi tiu studo, interesa kiel ĉio el la plumo de Kalocsay, pli bone estus trovinta lokon en alia verko, ne en legolibro.

Joh. H.

**Annie Rebers: Nia Mondo.** Lerno-libreto por infanoj. Eld. Fed. de Lab. Esp. en la regiono de la ned. lingvo, Amsterdam, 48 paĝoj. — Prezo guld. 0.30.

Gemo en mia buŝo: denove lerno-libreto. Denove por infanoj. Kie do estas ĉiuj tiuj infanoj, por kiuj la lernolibroj amase estas eldonataj?

La sistemon, laŭ kiu la aŭtorino verkis la libreton, oni povas aprezi: instrui dum la tempo, en kiu la infanoj ordinare vizitadas la lernejon, ne instrui dum la libertempoj de la lernejoj. Tiamaniere estiĝas ligo kun la infanoj, kiu estas fiksa kaj taŭga. La metodo mem, t.e. la materialo, ne portas multan novan. Certe la libro estas taŭga por instruado, sed ne pli ol la bonaj jam ekzistantaj libretoj, escepte de la « gvidilo por ne-profesiaj geinstruantoj », malantaŭe en la libro, kiu donas bonajn sugestojn. Tre utila ankaŭ estas la sistema enhavtabelo, kiu ebligas tujan transvidon de la libro. Nur... la paĝojn oni ne menciis en la enhavtabelo kaj serĉi laŭ la leciononombroj estas malfacile, ĉar tiuj ne troviĝas en la kapo de ĉiu paĝo.

Joh. H.

**Petro Danov: En la regno de la viva naturo.** Eld. Nova Kulturo, Sevlievo, Bulgarujo, 1936, dua eldono.

Ĝis nun mi neniam vidis la libreton, kvankam la titolpaĝo anoncas ĝian duan eldonon. Bedaŭrinde, ĉar ĉi tiun libron oni devas legi. Danov, el kies plumo jam aperis multaj broŝuroj, estas homo kun tre persona vido al la vivo, kaj estas ĉiam interesa studi la konceptojn de aliaj por profundigi sian propran aŭ — se necese — revizii ĝin. La lastan mi ne faris, ĉar la tezoj de Danov ŝajnas al mi ne ĉiam tute teneblaj el vidpunkto de la filozofia logiko, postulato unue necesa ĉe tezo. La hierarkian ŝtupigon en la regno de la naturo Danov ne vidas. Li nur vidas samnivelan fazon de la naturo, kies alta idealo estas la paca kunvivo. Ĉi tio estas ĝusta; sed la vojo, laŭ kiu Danov esperas atingi tion, estas barita per la peko de la homa genro. Kompreneble en recenzo ne estas la loko prui la neteneblecon de tezo, mi preskaŭ dirus: bedaŭrinde!

El la broŝuro vidiĝas, ke ĝuste dum nia tempo de kultura urba vivo, tamen la naturon kaj ĝian efikon je la homa vivo oni volas retrovi. Kaj pro tio ni ĝoju.

Joh. Hartog.

**Jarlibro de la Lingva Komitato kaj de ĝia Akademio, 1937.** — 24 p. 16x12 cm. Prezo 2 fr. fk. ĉe Esperantista Centra Librejo, 11, Rue de Sèvres, Paris 6, Francujo.

Enhavo: Raporto de la Prezidanto al la Kongreso; Nomaro kaj adresaro de la LK-anoj; LK-anoj laŭ la lingvoj kaj ilia elirjaro; Akademio; Mallonga historio de la Lingvaj Institucioj; Normigitaj naciaj diplomoj.

**Edward Ozimek: Eksplodo de l' paco.** Telegramo al la Ligo de Nacioj kaj al la Homo. Esperanta, de la aŭtoro plibonigita eldono. El pola lingvo tradukis inĝ. J. P. kaj J. Z. — 15 p. kaj kovrilo, broŝ. 14x19,5 cm. Prezo 20 groŝoj ĉe la aŭtoro, Długa 28/47, Warszawa, Polujo.

Broŝure kuraĝe skribita, kies ĉefa enhavo konsistas el 44 tezoj-postuloj, kiujn la aŭtoro opinias necesa por aliformigi la mondon. La plimulton el ili devas subskribi ĉiu komprenema homo. Ni esperantistoj jam plenumas almenaŭ la 17-an postulon de la aŭtoro, t. e. ke « oni devas enkonduki en ĉiujn lernejojn — krom la gepatra lingvo — ankaŭ la instruon de la internacia lingvo Esperanto ». Ni ne konsentas la kategorian aserton ke « Esperantistoj estas pacifistoj »; sed ni esperas ke ĉiuj esperantistoj estas sinceraj pacamantoj. Tutcerte ŝajnas al ni Esperanto la ĉefa (ne sola) rimedo, eĉ la premo, por atingi tutmondan daŭran pacon.

T. J.

**Franca bukado da dudek kantoj,** ĉerpitaj el nacia kaj regionaj literaturĝardenoj, laŭ adapto de Albert Masselier, militblindigito. Kun antaŭparolo de gen. L. Bastien. La libreto estas vendita profite al la Franca Asocio de Blindaj Esperantistoj (FABE). Prezo 2 fr. fk. ĉe la aŭtoro, 49, Boul. Fichot, Neuilly-Plaisance (S. et O.), Francujo.

**Cicio Mar: Forgesitaj homoj.** Noveloj. Eldonis La Verdfolio-Librejo, P.O. Box 731, Shanghai (=Shanghai), Ĉinio. — 240 p. 13x18,5 cm. Prezo 5 respondkuponoj.

**Hungaraj brodaĵoj.** Verkis Ladislao de Spolarich, direktoro de ŝtata virindustria instituto. 2-a kajero de serio « Pri Hungarlando por Tutmonda Esperantistaro » (la unuan kajeron ni ne ricevis). — 24 p. 15x23 cm. Eldonis Hungara Esperanto-Federacio, s-ro J. de Mihalik, Bęjczut. 1, Sashalom, Hungarujo.

Enhavas plejparte ilustraĵojn (25), kiuj prezentas la belegajn hungarajn brodaĵojn en variaj modeloj. La broŝuro ĉefe interesos virinojn. Prezo ne estas indikita; verŝajne oni liveras la broŝuron senpage, propagande por la hungaraj domindustriaj manlaboraĵoj.

**Foiro de Reichenberg,** 15-22. Aŭgusto 1937, Ĉeĥoslovakio, eldonis grandan esperantlingvan afiŝon (61x94 cm.) kaj la saman afiŝon en malpli granda formato (25x37 cm.). Ĝi montras la konatan RM-magneton, nunfoje en formo de aeroplano. — La Foiro eldonis ankaŭ novan esperantlingvan glumarkon (3,5x4,8 cm.).

**Internacia Specimena Foiro, Rio de Janeiro,** 12.X.1937—15.XI.1937. Eldonis afiŝon (44,5x70 cm.), kiu montras terglobon flugilhavan kaj la cititan esperantlingvan tekston.

**Krynica.** Bele ilustrita (per 35 bildoj) esperantlingva broŝuro pri la plej fama kuraĉloko en Polujo. — 24 p. kaj kovrilo, 10x20 cm. — Petu la broŝuron kaj ankaŭ pli detalajn informojn de: Ŝtata Estraro de Kuracejo, Fontkuraca Komisiono kaj Loka Vojaĝoficejo « Orbis », Krynica, Polujo.

**Viipuri.** Esperantlingva broŝuro 16-paĝa kun kartona kovrilo, 28 ilustraĵoj, urboplano ktp. Viipurin/Wiborg estas laŭ grandeco la dua urbo de Finnlando, fondita en 1293, do malnova sed tamen moderna. Interesuloj petu la broŝuron de: Viipurin kaupungin Retkeilylautakunta (Urba Ekskursia Komitato), Viipuri, Finnlando.



## Impona folkloraj kaj etnografia manifestacio en Lisbono, la Portugala ĉefurbo

La Nacia Radio-Studio organizis kaj efektivigis en Lisbono, ĉefurbo de Portugalujo, tre interesan paradon de portugalaĵoj, kies priskribo certe interesos la esperantistaron.

Partoprenis la paradon proksimume 3000 kamparanoj, venintaj el ĉiuj provincoj de la portugala metropolo, Azoroj kaj Madejro, kiuj, per siaj regionaj vestoj kaj metiaj laboriloj, donis folkloran lecionon al la popolamaso, kiu aliris rigardi ilin.

La multnombraj rigardantoj, devigitaj aliri piede al la festejo pro la elĉerpiĝo de taksioj kaj aliaj veturiloj, tre gratulis sin mem pro siaj pensoj, ĉar vere tiuj ĉi estis tre large kompensataj.

pojn en merinaj ŝaloj, la korpoj estas volvitaj per longaj manteloj. Flanke de la alegoria ĉaro, proksimume kvindek paroj dancas la paridan « *Corridinho* » (elp.: koridino = kurrapidaj dancaĵetoj laŭtakte de la harmonikoj, gitaroj kaj trianguloj, ludataj de la dancantaj viroj.

La suda kaj norda *Alentejo* prezentis falĉistojn kaj falĉistinojn, ĉi-tiujn kun la jupegoj ligitaj al la kruroj, kaj viraj feltĉapeloj, porkiston kun sia porka stabo, regionan tubforman veturilon, vendistojn de argilkruĉoj, de mielo kaj de kovriloj, rajdantojn sur azenoj.

En la mezo, la alegoria ĉaro dediĉita al la provinca riĉeco memorigas la por-

*Beira* sekvis, kun siaj grupoj, la ludistoj de tamburegoj « *Zé P'reiras* » (elp. *Ze-Prejraŝ*), paŝtistoj de la Stela Montaro kun siaj regionaj hundegoj (similaj al tiuj de S-ta Bernardo-hundraso).

La grupo de « *cantarinhas* » (elp.: kantarinjaŝ) de *Figueira*, knabinoj kiuj, ekvilibrante sur la kapo florkovritajn kruĉojn, dancas kaj kantas, kaj tiu de « *taboleiros* » (elp.: tabulejruŝ) de *Tomar*, kunportante surkape, anstataŭ la kruĉojn, altkronformajn ĉapelojn faritajn el drato interplektita, kiuj entenas panojn kaj florojn, same dancas kaj estas varmege laŭdataj.

*Traŝ-os-Montes* montris gevinistojn, virojn kun la kuriozaj pajlmanteloj neutralasantaĵoj akvon, sakfajfilludistojn kaj la faman grupon de « *pauliteiros* » (elp.: paŭlitejruŝ) de *Miranda*, bastonetdancistoj, kiuj kaŭzis sensacion en Londono kaj Parizo, antaŭ kelkaj jaroj, kaj kiuj surhavas blankajn vestojn kaj broditajn jupegojn kaj dancas frapante laŭtakte la bastonetojn unuj kontraŭ aliaj.

*Douro Litoral* memorigis la fagegan Porto, la mondkonatan portugalan vinon.

Tre interesa la grupo de feraĵistoj de *Penafiel* kaj ĝia spaddancado.

*Minho* (Minjo), la provinco de la belaj fraŭlinoj, kantas kaj dancas gaje. Ĝi estas la plej norda portugala provinco kaj per la belegaj multkoloraj inaj vestoj ĉiujn ravis.

Fermas la interesan sekvantaron paradon de la portugalaĵoj komunumoj, kies ĉiu sendis po unu paron da kamparanoj. Ĝi estis vere valora demonstracio, ordiganta la konojn akiritajn dum la unua parto de la feliĉa demonstracio, mirinda spektaklo, kiu meritas esti tutmonde konigata pere de nia Esperanto.

*Bigotte de Almeida.*



MINHO - INA VESTO

MADEIRA INSULO - VESTOJ

BEIRA - PAŜTISTO SERRA

Preterpasis unue la reprezentantaro de la *Azoraj Insuloj*, marŝante flanke de du alegoriaj ĉaroj rilatantaj al la balenkaptado kaj al la azoraj produktoj, kiel ananasoj kaj aliaj bongustegaj fruktoj, fromaĝoj kaj teo. Ĉiuj notis la strangajn kaj larĝajn blankajn vestojn, kiun la viroj surhavas, kaj la longajn mantelojn de la virinoj, kiuj ridetas dolĉe kantante monotonajn melodiojn.

Jen poste la *Madejra Insulo* kaj ĝiaj brodistinoj kaj floristinoj, kun siaj ruĝbluaj jupegoj kaj, sur la broditaj ĉemizoj ŝveligitaj de la naturaj pomoj, la nigraj aŭ ruĝaj aŭ bluaj korsetoj kruce laĉitaj per silkaj ŝnuretoj. La viroj, la *vilaĝanoj*, kiel ili estas nomataj, vestiĝas blanke, surhavas pajlĉapelojn kaj vestas la piedojn per altaj botoj ruĝbroditaj.

Sekvis la mondkonataj madejraj senradaj turistveturiloj, kiuj surglitas sur la ŝoseoj, kaj pli ol dudeko da madejranoj, kantante kaj dancante popolajn regionajn dancojn. La rigardantoj brue aplaudis la belan elmontraĵon de la portugalaĵoj apudaj insuloj kaj ne plu finis tian bruantan entuziasmon.

*Algarvo*, la plej suda portugala provinco, alvenis kun siaj fiŝkaptistoj kaj tre interesaj virinoj. Tiuj ĉi kaŝas la ka-

tugalan korkindustrion (\*) kaj la tritikplantejojn.

*Estremadura* kaj *Ribatejo* fieras montris siajn fiŝkaptistojn, fiŝvendistinojn kaj « *Campinos* » (elp.: kampinuŝ), la portugalaĵojn bovgardistojn, tiel malsimilajn al la nordamerikaj « *cow-boy* » kaj al la sudamerikaj « *gauchos* ».

La fiŝkaptistoj el *Nazaré* surhavas ĉemizojn el kolorigitaj ŝtofoj ŝakformaj kaj ĉirkaŭas ĉaron kiu alportas veran grandan barkon kun la plej maljunaj fiŝkaptistoj, blankbarbeguloj, interne.

La *Lisbonaj* fiŝvendistinoj ne mankis. Ili preterpasas kantante kun la karbistinoj kaj lavistinoj de la Lisbonaj ĉirkaŭaĵoj. Cent kvindek « *kampinuŝ* », kun ruĝaj, flavaj, verdaj aŭ bluaj jaketoj sur blankaj broditaj ĉemizoj, alikoloraj pantalonetoj kaj ĉapoj kaj la blankaj ĝisgenuaj ŝtrumpoj, rajdas starigante la « *pampiljojn* » (trimetre longaj stangoj), kiuj anstataŭas la amerikajn « *lazo* »-jn.

Knabinoj, tordante la elegantajn korpojn en la regionaj dancoj « *Vira* » kaj « *Fandango* », bastonluktistoj, gerikol- tistoj de vinberoj, gesalistoj, ĉiuj estas ĝoje laŭdataj de la ĉeestantoj.

(\*) Portugalujo estas la ĉefa produktanto de korko en la mondo.

## Dum la balo

(Melodio de Erik Meyer-Helmund.)

La pleje fieraj sinjoroj  
Al vi amindumas sen ĉes',  
Humile, kun flatoj kaj floroj,  
Kaj tamen sen iu sukces'.

Nur kaŝe ridetan rigardon  
Vi sendis al mi en silent'.  
Por senti de l' koro la ardon  
Sufiĉis flugema moment'.

Neniu el ili komprenas  
La diron de via okul',  
Neniu el ili divenas  
La scion de mi feliĉul'.

Ke nin post ilia foriro  
Nur vidos la luna bril'  
Dum drono de nia sopiro  
En kisoj mil kaj mil.

Karl Vanselow

D-ro A. Sommer-Batek :

## Projekto kiel ordigi la mondon per kulturaj fortoj (1)

(Daŭrigo.)

### Kiel oni konservu la registradon ?

La papero ne estas solida materialo. Ĝi disfalos de si mem. Pli daŭraj estis la brikoj de kojnoskribo kaj la surskriboj en la piramidaj muroj, aŭ en Altamiraj grotoj. La hodiaŭa tekniko scias fabriki maldikajn platojn el metalo, kiuj preskaŭ ne estas detruiblaj. Ankaŭ la problemo de la daŭrebla skribo sur tiuj platoj estas jam teknike solvita kaj en kelkaj ŝtatoj eĉ patentita. La metalaj platoj ne estas io nova. Jam en pratempoj oni uzis ilin, kiel pruvis la elfosaĵoj de la Orienta Universitata Instituto en Ĉikago sub gvido de D-ro Schmidt. Li trovis en Persepolis kalkan keston kun du platoj, unu el oro kaj dua el arĝento, sur kiuj estis skribaĵoj en tri lingvoj : elamita, babilona kaj antikvapersa. Ili estis tiel bone konservitaj, kvazaŭ nun faritaj.

### Kiel oni konservu la registradon al estontaj tempoj ?

Estas necese krei arkivon internacian kaj arkivojn naciajn, en kiuj oni konservu la kulturajn registradojn. La ideografika arkivo internacia povus esti aligita al la Monda Palaco en Bruselo, kie oni konservas la tutan mondliteraturon. Sed oni devus alkonstrui subterajn sekurajn ejojn, similajn al tiuj, en kiuj oni konservas la prototipojn de la mezuriloj. Tiu pazigrafia registro kun esperantlingva traduko estus konservata kiel prototipo en la internacia arkivo. Ĝiajn kopiaĵojn devus konservi tiuj naciaj arkivoj, kies ŝtatoj promesas gardi ilin simile kiel en la internacia arkivo kaj kiuj tradukus ilin en siajn naciajn lingvojn.

### Kiel oni kompletigu la sciencojn ?

Al kompletigado de la sciencoj estus necese, ĉiujare kontroli la arkivojn kaj noti la ŝanĝojn de ideoj sur apartaj folioj sub la sama nombro registra, sed kun la nova jara dato. Laŭ tiuj folioj oni presigus kopiaĵojn vendeblajn al interresuloj aŭ abonantoj de la internaciaj registradoj. Per tiu mono oni povus eĉ gajni kapitalon por subteni la konservadon de tiuj arkivoj.

### Kiel oni eluzu la klasigitan sciencon ?

Kiel jam dirite, estas la dua tasko de la parlamento kultura : Plibonigo de la vivo de ĉiuj homoj. Per la organizo kaj registrado de ĉiuj sciencoj tiamaniere, ke oni ĉiun sciencon laboraĵon tuĵ tro-

vus, se oni bezonus ĝin, fariĝus la kultura parlamento kvazaŭ praktike ĉionscia. Temas do pri tio, kiel eluzi ĉiujn sciencojn por la plibonigado de la nuna vivo. En unua vico oni devus plibonigi la leĝojn kaj la juron. Laŭ fundamento de scienca materialo oni devus krei kodojn de diferencaj fakoj sciencaj kaj kulturaj. Unu el la plej gravaj estus la **Kodo de universala homa rajto**, en kiu oni klare montrus, en kio konsistas la vivraĵo de ĉiu homo. Tion devus pristudi la « Ligo por la Homa Rajto », kiun oni devus inviti al tiu laboro. Laŭ tiu kodo oni devus krei

### Idealan leĝaron

por ideala ŝtato. Ideala ŝtato memkompreneble postulas ankaŭ idealan popolon.

Ankoraŭ ne ekzistas en la mondo la ideala ŝtato kaj ideala popolo. Tial oni devus poste kompari la ekzistantajn leĝarojn kun la ideala leĝaro, studi la diferencojn kaj serĉi la kaŭzojn de tiuj diferencoj. Poste oni klare ekvidus, ke por popolo malklera ne taŭgas tiom da libereco kaj da rajtoj, kiom por popolo klera kaj bonedukita. El tio rezultus la klopodo, gvidi la popolon al klereco kaj memdisciplino. Per tio la diferencoj malgrandiĝus, ĝis kiam ili plene malaperus. Krom tiu unuigo de nacia leĝaro oni devus konstrui la internaciajn interrilatojn. Al tio servus

### Kodo de internacia juro,

laŭ kiu sin direktus la « Ligo de Nacioj », kiu hodiaŭ juĝas laŭ la juro de la plej forta membraro kaj laŭ sankcioj, kiuj efikas plejparte per timo kaj ne per konvinko.

Estas kompreneble, ke la plibonigo de la homaro baziĝas sur la plibonigado de la popola sano. Tial ankaŭ la Internacia Ruĝa Kruco zorgas unuavice pri tiu problemo. Kun helpo de tiu entrepreno oni povus krei

### Kodon de internacia higieno,

per kiu oni elverkus kun helpo de similaj entreprenoj naciaj kaj internaciaj la necesajn ordonojn eŭgenikajn kaj eŭbiotikajn.

Tre grava estas gvidi la homaron al pli bona vivo per la perfektigado de estonta edukado. La komencojn jam faris diversaj pedagogiaj societoj kaj la skoltoj. Per ilia helpo oni kreus

### Kodon de internacia edukado,

per kiu la homaro estus gvidata al pli bona privata kaj universala sociala vivo.

Kodo pri enkonduko de administraj entreprenoj direktus la administradon de diversaj partoj de la mondo. Oni nun malrapide preparas la Paneŭropon. Ankaŭ en Ameriko oni pensas pri Panameriko kaj panamerika juĝistaro, simila al Ligo de Nacioj en Ĝenevo. Oni laŭbezone povus krei ankaŭ kodon pri komerco, ktp. Sendube la ekzistanta banko por la eksterlandaj transakcioj povus multe servi al la internacia komerco, se ĝi eldonus monon, kiu en ĉiuj ŝtatoj havus la saman valoron.

### Kiel malaperigi la almozetantojn ?

El la kodoj oni ekvidus, ke ĉiu homo, ĉu bona aŭ malbona, ĉu sana aŭ malsana, ĉu riĉa aŭ malriĉa, devas vivi, el kio rezultas la rajto al vivo. La homa societo havas la rajton postuli de ĉiu, ke li laboru por la bono de la tuta homaro. Tiu rajto estas ligita kun la devo, ebligi al ĉiu homo, ke li laŭ siaj fortoj, kapabloj kaj talentoj utiligu sian vivon. Ĉi tie temas pri iu moderna kontrakto sociala, kiun oni devus prilabori, por utiligi ĝin. Ĉiu homo, kiu volas vivi, devas manĝi, spiri, dormi, kaj plenumi siajn devojn, siajn bezonojn. La homa socio estas devigata kiel tutaĵo al ĉiu plifaciligi tiujn fundamentajn vivcondiĉojn. Tial oni devas doni al ĉiu rajtojn al freŝa aero, bona akvo trinkebla kaj uzebla, simpla bona nutrado, dormado ktp. La societo postulas de ĉiu, ke li sin vestu konvene kaj havu konstantan loĝejon. Se la societo tion postulas, tiam ĝi devus ebligi al ĉiu, akiri senpage vestojn kaj loĝejon. Sed se la societo havas tiajn devojn, ĝi povas postuli rekompence ekvivalentan laboron de ĉiu.

(Finota.)



*do Mo-libroj plej diversaj,  
Verkoj prozaj, verkoj versaj  
Stendadas, ke legante  
Vi vin distru plejante.  
Ĉiu libro: trezoreto  
Kaj ornamento de libroreto.*

Petu prospekton de  
**HEROLDO DE ESPERANTO**  
Scheveningen — (Nederland)

# LA ESPERANTISTA REKLAMO

## La prezo de anoncetoj

estas egalvaloro de 10 belgaj frankoj aŭ 0.60 ned. guldenon, por la unuaj 20 vortoj aŭ mallongigoj; por ĉiuj pliaj 10 vortoj komencitaj 5 belgaj frankoj aŭ 0.30 guldeno. La anoncetoj aperas en la semajna kaj (laŭ la disponebla loko) monata organoj de Internacia Esperanto-Ligo, nome en « Heroldo de Esperanto » kaj « Esperanto Internacia ». Por mendi anoncetojn, oni turnu sin al la Administracio de **Heroldo de Esperanto, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando; nederlanda poŝtĝiro 1306.30 ('s-Gravenhage); belga poŝtĝiro 2044.04 (Bruxelles).**

**Naskiĝo.** Fileto Georgo naskiĝis ĉe komerc-lerneja profesoro Roberto Wagner, del. de IEL en **Budapest-Obuda**, Hungarujo. Plej korean gratulon!

**Danko.** La delegito de IEL en **Panevezys** (Litovujo) J. Kanas kore dankas la Prahon samideanaron, precipe la delegiton s-ron Otto Ginz, la prezidanton s-ron Šustr kaj s-anojn D-ron Pumpur kaj Bordebova pro ilia sincereco kaj servo dum mia restado en ilia ĉarma urbo. Ĝi restos en mia vivo kiel hela folio de historio pri Esperanto.

**Sensacia novaĵo: nerustigantaj plumoj,** preskaŭ anstataŭas fontplumon, ĉar post unu enprofundigo en inkon ili sufiĉas por skribi 200-400 vortojn. Dekduo da plumoj kostas egalvaloron de 1.45 ned. guld. afrankite, aŭ 11 respond-kuponoj, nur kontraŭ antaŭpago. — Leon Machlis, Jeruzolimska 37/14, **Warszawa**, Polujo.

**Ĉiulingvaj librojn,** broŝurojn, gazetojn, kaj revuojn kun artikoloj de kaj pri la ĉeĥoslovaka ŝtatprezidinto **T. G. Masaryk** bonvolu sendi kontraŭ rekompenco al s-ro Dolfa Bartošík, Esperanto-instruisto, **Otrokovice-Batov**, Ĉeĥoslovakio. La celo: propagandi Esperanton en medioj kontraŭesperantaj. Sukceso treege helpos min! (444)

**Grandan packunvenon publikan** partoprenos 23 okt. 1937 Esperanto-grupo, kiu deziras ricevi ilustritajn poŝtkartojn por elmontri disvastigon de Esperanto. Bonvole sendu kun pacema skribaĵo al s-ro Chinn, 41 Digswell Road, **Welwyn Garden City**, Herts., Anglujo. — Grupo respondos.

**Literatura Mondo** — nia sola literatura gazeto. Kunlaboras ĉiuj gravaj esperantistaj verkistoj. Abono por jaro guld. 4.50 ĉe Heroldo de Esperanto, Harstenhoekweg 223, **Scheveningen**, Nederlando. (388)

**Lingvo-Libro** informas vin pri ĉiu okazo en nia literaturo. Abonu ĝin kune kun viaj amikoj! Abonprezo por jaro kaj tri ekzempleroj kune sendataj por egalvaloro de 0.80 ned. guld. ĉe la eldonejo Literatura Mondo en **Budapest**. (394)

**Internacia Koresponda Centro**, 2e Helmersstraat 22, **Amsterdam**, Nederlando, serĉas reprezentantojn por diversaj landoj (en kaj ekster Eŭropo).

**Sendu diversajn poŝtkartojn** de via lando; mi sendos al vi la saman kvanton da belgaj. Severanckx, Kapucien Voer, 42, **Leuven**, Belgujo.

« **Frateco** ». En ĉiu nova numero tiu ĉi revuo alportas al vi altan idealon kaj vin instigas al nova racia laŭnatura vivo. Abonkotozo 1 sv. fk., 3 resp.-kuponoj, kaj ĉiu egalvaloro. Adreso: « **Frateco** », Gazeto por frateca vivo, **Sevlievo**, Bulgarujo. (435)

**Publika Librarejo, Meadville, Pa.,** Usono, deziras ricevi **nacikostumpupojn**, altajn je 25 centimetroj. Sendu antaŭkarton informan! Conrad Fisher, **Meadville, Pa.,** Usono.

**Orienta Kulturo** kvaronjare aperas kun riĉa enhavo ilustrita. Orientaj problemoj freŝe traktataj. Jarabono: 8 resp.-kuponoj internaciaj. Specimeno kostas unu resp.-kuponon. Societo de Orienta Kulturo, Komagome-Dozaka 228, **Tokio**, Japanujo.

**Kvakerismo kaj Paco.** Por senpagaj ekzempleroj de literaturo (Esperanta kaj angla) skribu al Friends Service Council, Friends House, Euston Road, **London N.W. 1**, Anglujo. (432)

**S-ro V. Šavel**, Strašnice, Rybníčky, **Praha**, Ĉeĥoslovakio, donas artikolojn uzeblajn por naci-lingvaj revuoj, petas artikolojn pri radio, televido por ĉeĥoslovaka naci-lingva revuo. Okaze de publikigo de via sciigo vi ricevos pruv-ekzempleron. (438)

**Poŝtkartojn** interŝanĝas kun seriozaj filatelistoj. Por 500-5000 ĉiam sendos saman kvanton aŭ samvalorajn laŭ Michel. Z. Székely, **Pestszentlőrincz**, Kossuth u. 198 b, Hungarujo. (Delegito de IEL). (440)

**Por respondkuponon** vi ricevas rakontojn el la hungara literaturo (32 paĝoj). Sendu al P. Balkányi, **Budapest 507**, Hungarujo. (441)

**Internacia Katolika Informejo.** — Ne-katolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika kredo, senpage povas ricevi ilin de **Fr. M. Monulfus**, sekretario de l' Internacia Katolika Informejo, Instituto S-ta Nikolao, **Oss**, Nederlando. (310)

**Kursgvidantoj atentu!** Ni helpas al vi dum la kurso kaj sendos donacon por viaj lernantoj. Skribu al K. Kalocsay, Hungarujo, **Budapest VIII**, Mária-u. 34. (407)

**Rakontoj kaj artikoloj** pri homoj, bestoj kaj aventuroj en Borneo kaj aliaj aziaj landoj, de R. F. Vaughan: « **El Verdaŭalo** » por 1936; 48 paĝoj kontraŭ 5 internaciaj respondkuponoj. Mendu senpere de R. F. Vaughan, Sandakan, British North Borneo. (370)

**50 ĉeĥajn kronojn kiel rekompencan** ricevos la samideano, kiu resendos al mi la binditan « pirato »-kolekton (malhelverda libro), kiun mi perdis dum la Jubilea Kongreso en Varsovio. Hugo Popper, **Böhmisch-Kamnitz**, Ĉeĥoslovakio.

**Geesperantistoj,** sendu vian fotografaĵon kaj adreson, vi ricevos komencon de esperantista albumo kun multaj fotografaĵoj kaj adresoj senpage. Bonvolu sendi al: A. Indrulis, Fotatelja, **Laizuva**, Litovujo.

**P. Moen**, del. IEL, Nunspeetlaan 508, **Den Haag**, Nederlando, deziras interŝanĝi poŝtkartojn eŭropajn kaj ekstereŭropajn. Respondo garantiata, almenaŭ unufoje. Ne sendas unue.

**Nederlando:** S-ro N. Zilver, Zach. Jansstraat 53, **Amsterdam**, deziras poŝtkartojn kaj bildkartojn el aliaj landoj (Centra Eŭropo nur laŭdezire). (442E)

**Ni volas interŝanĝi** leterojn aŭ poŝtkartojn kun samideanoj en la tuta mondo. Certe respondos. — S-ro R. A. Tippetts, 36 Westsex Avenue, Horfield, **Bristol 7**, aŭ: s-ro R. T. Baggis, 29 Ponsford Road, Knowle, **Bristol**, Anglujo.

**Pri religiaj kaj kulturaj aferoj** estas tutmonda korespondado dezirata. Bonvole respondu al paroĥestro Harald Holmberg, **Edsele**, Svedujo.

**Japana 22-jara fraŭlino** deziras korespondi kun tutmondaj gesamideanoj. F-ino Kazuko Yosiki, Maruyama 2, Sumiyosi-ku, **Osaka**, Japanujo.

**22-jara ofcisto** deziras korespondi pri ĉiuj temoj, precipe pri vivmanieroj kaj vivkondiĉoj de diversaj popoloj. Interŝanĝas fotojn kaj gazetojn. Štefan Tomek, Urba ŝparkaso, **Bratislava**, Ĉeĥoslovakio.

**Germana 40-jara fraŭlino** serĉas seriozan korespondadon kun geesperantistoj ne pli junaj ol 40 jaroj. Bagatelojn ne akceptas. Frieda Schulz, Kitschburgerstr. 233, I., **Köln-Braunfeld**, Germanujo.

**Juna svedo**, kiu ĵus komencis lerni Esperanton, volas korespondi kun samideanoj en la tuta mondo. Mi garantias respondon. — P. G. Peterson, Box 62, **Rottne**, Svedujo.

**Sveda samideano** deziras korespondi kun samideanoj de ĉiuj landoj. Certe respondos. S-ro Oskar Hallgren, Box 99, **Hyltebruk**, Svedujo.

**Filatelistoj!** Sendu 50 aŭ 100 poŝtkartojn vialandajn, kaj vi ricevos samnombrojn kaj samkvaliton da belgaj. Frans Kinnart, Kapucien Voer 98, **Leuven**, Belgujo.

**Filatelismo.** S-ro Arpád Serényi, Foto, **Zalae-gerszeg**, Hungarujo, sendas por 50-150 diversaj, lavitaj poŝtkartoj saman kvanton da hungaraj. Interŝanĝas ankaŭ artajn fotojn.

**Varsovio, Pollando**, str. Chmielna 67, s-ro Stefano Szmidt, deziras korespondi kun tutmondaj esperantistoj kaj interŝanĝi poŝtkartojn ktp.

**Andrej Sidorov**, Sredne-Smolenskaja ul. 28, **Voronej**, U.S.S.R., petas amikojn de Sovet-Unio jam nun sendi al li salutleterojn okaze de 20-jara datreveno de oktobra revolucio, por ruslingvaj ĵurnaloj; eĉ anonimaj leteroj estas dezirindaj.

**20-jara knabo** deziras korespondi kun gejunuloj pri diversaj temoj. Skribu al: S-ro Harry Törnskog, Högalidsgatan 34, **Stockholm**, Svedujo.

**Du svedaj gefratoj**, en la aĝo de 18-21 jaroj, deziras eksterlandajn korespondantojn. Skribu al: f-ino Inga Svensson aŭ s-ro Lennart Svensson, Brl. 170, **Ronneby**, Svedujo.

**22-jara ŝoforo**, s-ro Kristian Nymann, Erholm Slot, **Aarup St.**, Danlando, deziras korespondi kun eksterlandaj gesamideanoj.

## KORESPONDA CENTRA INTERNACIA AMSTERDAM

2e Helmersstraat 22 (Nederlando)

havigas ĉiuspacajn korespond-adresojn, ebligas korespondadon kun ĉiuj landoj, pri ĉiuj temoj, en ĉiuj lingvoj, organizas ŝak-, briĝ- kaj damkonkursojn, havas specialan filatelan merkaton.

**P e t u d e t a l a j n i n f o r m o j n !**  
(445E)

Presejo de Belgia Esperanto-Instituto K. S. Antverpeno — Belgujo.





# 30-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

=====

L O N D O N O

30 JULIO — 6 AŬGUSTO

=====

1938

=====

Kongres-Oficejo: INTERNACIA ESPERANTO-LIGO,  
HERONSGATE, RICKMANSWORTH (HERTS), ANGLUJO.

## ALIĜILO

Mi aliĝas al la 30-a Universala Kongreso de Esperanto, kaj kun-  
sendas ..... laŭ la detaloj dorsflanke.

Familia nomo (1). S-ro, S-ino, F-ino .....

Personaj antaŭnomoj (1) .....

Profesio (2) .....

Nacieco (2) .....

Urbo (1) ..... Lando (2) .....

Strato (1) ..... N-ro .....

.....193..... Subskribo .....

(1) En nacia lingvo.

(2) En Esperanto.

VIDU DORSFLANKE  
SKRIBU PLEJ KLARE

se eble, per skribmaŝino.

## KONGRES-KOTIZOJ

	Ĝis 31/12/37	Ĝis 31/3/38	Post 31/3/38
1 Kongres-kotizo . . . . .	£ 1 0 0	£ 1 5 0	£ 1 10 0
2 Por la edzo aŭ edzino de Kongresano . . . . .	10 0	12 6	15 0
3 Por gejunuloj ne pli ol 20-jaraj . . . . .	10 0	12 6	15 0

## PAGOJ SENDATAJ

	£	s	p.
Por Kongresa karto . . . . .	:	:	:
Por edzo (edzino) . . . . .	:	:	:
Por junulo . . . . .	:	:	:
Kiel donaco al la Kongresa kaso . . . . .	:	:	:
Kiel donaco al la blindula kaso . . . . .	:	:	:
SUMO	:	:	:

Estas akceptataj ĉiuj pagiloj ŝanĝeblaj en bankoj, internaciaj poŝtmandatoj, monbiletoj, k.t.p.

Laŭ la angla monsystemo 12 pencoj = 1 ŝilingo.  
20 ŝilingoj = £ 1.

Tuj post ricevo de la kotizo oni sendos provizoran karton al la kongresano.  
En konvena tempo ĉiu kongresano ricevos mendilojn por loĝejo, ekskursoj, k.t.p.

Nomo de edz(in)o .....